5-a Jaro. N-o 257 APERAS SEMAJNE 5. Septembro 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

LA KALVARIO DE LA NIGRA RASO

La sorto de la amerikaj negroj estas aparte malĝojiga ĉapitro el la historio de la koloniigo. Alkondukitaj en la Novan Mondon kiel sklavoj depost la komenco de l' 17-a jarcento kaj liberigitaj depost 1863, la negroj, "liberaj" civitanoj de la lando, ĉe kies enirejo leviĝas la statuo de l' Libero, plue suferas la plej abomenindan subpremon. Ĉi tiu neniel malsuperas al la krimagoj plenumitaj de aliaj koloniigantoj en Afriko, Azio kaj Oceanio.

Se ekzistas diferenco inter la usona kaj eŭropa metodoj, ĝi ne estas je la avantaĝo de l' unua. La imperialistoj de Eŭropo estas brutaj kaj cinikaj: ili traktas la kolorajn popolojn malkaŝe kiel malsuperajn rasojn kaj esprimas tion en la leĝaro. La 100%-usonanoj aldonas al la bruteco kaj la cinikeco la hipokritecon: ili suferigas la plej kruelajn persekutojn al samcivitanoj, al kiuj la leĝo de 1863 garantias la samajn rajtojn konstituciajn kiel al la blankuloj.

Skot Niring (Scott Nearing) ĵus publikigis libron "La Nigra Ameriko"[1]. Ĝi estas forta volumo, ŝtopita per faktoj kaj dokumentoj, rimarkinda pro la sobreco de l' stilo kaj la objektiva tono de l' raporto. Sed ĝuste tiu ĉi sobreco, tiu ĉi objektiveco faras el ĝi tiom frapilegan akuzadon tiel senkompatan kaj tiel nekontraŭstareblan, ke ĉe ĝia legado la indigno kaj la kolero skuas vin ĝis la plej profundo de via esto.

Tute ne volante elĉerpi la enhavon de l' libro, ni donos ĉi sube kelkajn faktojn kapablajn reliefigi la valoron de tiu ĉi verko.

De la lulilo ĝis la tombejo

La stultega malamo de la blankuloj kontraŭ la negroj manifestiĝas en la plej ĝenerala maniero per la el-apartigo. De la lulilo ĝis la tombejo la negro estas enfermita en la malvasta cirklo de sia raso. En la pasinta tempo limigita al la Sudŝtatoj, kie la negroj ĉiam konsistigis fortan kontingenton de la loĝantaro, tiu ĉi rigora apartigo de l' rasoj etendiĝas



pli kaj pli tra la tuta teritorio de Usono.

— Ĉie, kie la nombro el negroj estas nekonsiderinda, diras Skot Niring, la rasproblemo ne ekzistas. Sed tie, kie la negroj estas nombraj, la problemo stariĝas en akuta formo...

Ekzistas nuntempe en Usono dekdu milionoj da negroj — preskaŭ dekono de la tuta loĝantaro. Tiu ĉi dekono estas traktata kiel eksterleĝa kaj subigata al la plej malnoblaj turmentadoj. Depost sia naskiĝo, la negro estas enfermita en speciala kvartalo de sia urbo, speco de "ghetto" (judkvartalo). Ekzistas eĉ nombro el urboj, kiuj toleras neniun negron en sia teritorio. Negro, kiu riskus resti tie dum nokto, eĉ se estus nur dum trairo, estus en danĝero esti linĉata (= senjuĝe mortigata).

Enfermita en tiu ĉi malvasta sfero, ĉirkaŭita de malbondeziroj, inciteco kaj malamo, la negra infano grandiĝas. Ĝi iras en la lernejon. Ankoraŭ regas la apartigo. Specialaj lernejoj por la negroj, apenaŭ subtenataj, preskaŭ tute senigitaj de subvencioj, kiuj abundege fluas por la blankuloj. La plejparto de l' blankaj instruistoj ricevas salajrojn je 100% superajn al tiuj de iliaj nigraj kolegoj.

Post la lernejo estas la panakiro. Ĉie la negro estas malsupera. Ĉe egala laboro lia salajro estas malpli alta. En la malvigla komerca periodo kaj en la krizo estas li la prefere maldungata. La okupoj, kiuj postulas kvalifikitan laboron, estas fermataj al li spite la kvalifiko, kiun li povis akiri.

Ekzistas preĝejoj por blankuloj kaj tiaj por la negroj. La religiaj societoj rifuzas akcepti negrojn en sian mezon kaj devigas ilin sin organizi aparte. En dokumento citita de Skot Niring, ni legas jenon:

La apartigo depost la infanetara lernejo kreskas al la apartigo sur pli altaj ŝtupoj. Ĝi neprigas la apartigon en la kolegioj kaj en la universitatoj, kie la atmosfero fariĝas pli kaj pli netolerebla por tiuj, kiuj jam estis reĵetataj kaj enfermataj depost la plej malaltaj ŝtupoj de l' lerneja sistemo. Kaj la personoj, kiujn oni juĝas neindaj en la kolegio je la sama benko kiel vi, certe ankaŭ estas neindaj sidiĝi ĉe via flanko en la kino, en la tramo aŭ en la parko. La apartigo en la preĝejoj anticipas logike la apartigon en la paradizo. En Nov-Orleano ni jam havas la partigon en la tombejoj, ĉar la apartigo de l' vivantoj necesigas tiun de la mortintoj.

[1] The Vanguard Press, Novjorko, 1929. "Black America".

Kiel la blankuloj manifestas sian "superecon"

En ĉiuj skaloj de la socia vivo la blankuloj tiris la "kolor-linion", la linion, kiu apartigas la negrojn de la blankuloj. Tiu ĉi linio estas rigore observata en la fervojoj, la tramoj, la teatroj, la restoracioj, ĝis la publikaj ĝardenoj kaj ban-instalejoj.

"La negroj estas forigitaj el ĉiuj komunumaj parkoj de Sinsineti (Cincinnati) kaj eĉ el la urba banejo. En Indianapolis organizitaj bandoj forpelas ilin per gumbatilaj frapoj el la publikaj ĝardenoj. En Ĉikago (Chicago) la blankuloj utiligis ŝnurojn kaj pafilojn por "elpurigi" la Geĝ(Gage)-parkon... En Boston la negroj estas forigataj de la parkoj, lud-terenoj, banejoj, hospitaloj kaj muzeoj."

"En Baltimor (Baltimore), por citi nur tiun ĉi urbon, la negroj iam havis la permeson sidi en la balkono de l' teatroj, dum la pargeto kaj la orkestro ĉiam estis fermataj al ili. Hodiaŭ oni ilin eĉ nur ankoraŭ allasas ĉe la lastaj rangoj de l' balkono, aŭ starloke...

"Oni renkontas la samajn agmanierojn en Novjorko. Se negro petas biletojn, oni diras al li: "la salonego estas plenplena; oni havas nur ankoraŭ tiujn ĉi lokojn. Kaj oni donas al li biletojn por la sekcio rezervita al la negroj...

"Okazas, ke negro sendas amikon de blanka raso por preni biletojn por la pargeto. Li prezentas sin ĉe la enirejo kun tiuj ĉi biletoj. "Estas eraro, diras la pordisto. Tiuj ĉi biletoj ne validas por tiu ĉi vespero. Sed se vi volas tiajn por ĉi tiu prezentado, jen aliaj"... por la sekcio rezervita al la negroj.

"Aŭ bone: tiuj ĉi sidlokoj jam estas okupitaj. Atendu, jen aliaj... por la sekcio rezervita al la negroj.

"En multaj ŝtatoj, la leĝo devigas la restoraciojn priservi ĉiun klienton. Ne povante rekte rifuzi servi al la negroj, oni atendigas ilin unu aŭ du horojn antaŭ ol akcepti la mendon, kaj unu aŭ du aliajn horojn por servi al ili la menditajn manĝojn. En multaj restoracioj la kelneroj metas kuleron da pipro en la lakton kaj kuleron da salo en la kafon menditajn de negro; aŭ ankaŭ, ili paggigas al li la kvinoblon de l' prezo kaj servas al li kiel trinkaĵon postlavan akvon...

"Antaŭ nelonge juna blanka virino kaj negro promenis kune en Novjorko, en la 86-a strato. Ĉiuj pasantoj returnis sin por ilin esplorrigardi. Oni devas aldiri, ke Novjorko estas unu el la plej liberaj urboj konsidere la rilatojn inter la rasoj. Tamen oni vidas tie tiel malofte kune blankulojn kaj negrojn de diferenca sekso, ke simila paro altiras la ĝeneralan atenton.

"En la malpli kosmopolitaj urboj negro, kiu promenas en la stratoj kun blanka virino, riskas insultojn, mokojn, eĉ la ŝtonmortigon...

"Oni ne toleras, ke la negroj kaj la blankuloj dancas kune publike. Maldekstra organizo en Novjorko estis organizinta publikan balon, kie negroj dancis kun blankaj virinoj. Tial la polico intervenis por ĉesigi la dancadon...

Sufiĉas anonci gefianĉiĝon de juna blanka filino kun negro por elvoki plej larĝan priparolon en la ĵurnaloj kaj por inciti la popolaĉon al la perforto.

"La 14. julio 1922 la negro Ĵak Devis de Kolkŭit (Jack Davis de Colquit) — Georgio — estis linĉata, ĉar li estis patriniginta blankan virinon. La koncerna virino vane asertis, ke ĉio okazis kun ŝia plena konsento. Ĵak Devis devis suferi la sorton, kiun la linĉ-leĝo difinas por simila "krimo".

Linĉado

"La linĉo estas la metodo, per kiu la apartigo kaj izoliĝo estas trudataj al obstine kontraŭstaremaj membroj de la nigra raso. Negroj, kiuj sendiskute rekonas sian malsuperan pozicion, kiuj sekvas la ordonojn de l' blankuloj, kiuj submetiĝas al iliaj vidpunktoj kaj obeas iliajn decidojn, kiuj akceptas la salajrojn, kiujn oni al ili prezentas kaj kiuj faras la postulatajn laborhorojn, estas apenaŭ maltrankviligataj."

En la mala okazo furioza subpremo estiĝas, kiu iras ĝis la linĉo. Ĉiu socio antaŭvidas punojn por krimetoj kaj krimoj, pri kiuj ĝiaj membroj kulpiĝas. Usono havas sian leĝaron kiel ĉiuj aliaj landoj. Nigra aŭ blanka, la kulpulo laŭ la leĝaro altiras sur sin la samajn punojn. Ĉu vi estas ŝtelisto, monfalsisto aŭ murdisto, la juĝado estas la sama por ĉiuj. Kun tiu ĉi malgranda diferenco, ke la blanka popolaĉo, sub la bonvola okulo de la reprezentantoj de l' estraro, forŝiras perforte la negrajn akuzitojn el la manoj de l' kompetentaj tribunaloj, por ilin ekzekuti laŭ la linĉritoj.

"La usona linĉado estas en multaj okazoj publika spektaklo, kiu konkurencas, rilate al siaj dramaj efektoj, kun la virbovo-bataloj kaj kun la luktoj de la romaj gladiatoroj. La linĉado estas ofte anoncata antaŭe kaj plenumata sur publikaj placoj. Inter la miloj da rigardantoj troviĝas viroj, virinoj kaj infanoj."

Ne necesas granda afero por esti linĉata. Sufiĉas havi haŭton kaj gestojn malplaĉajn al blankuloj tute influataj de la sento de sia "supereco". Mastro malfruas kun la pago de l'salajro, kiun li ŝuldas al vi. Vi postulas la pagon de tiu ĉi sumo, kiun vi bezonas. Malfeliĉe vi estas negro. La mastro forpelas vin per piedbatoj, kaj se vi insistas, troviĝas facile bando da reprezentantoj de la "civilizo" blanka por lernigi al vi prudenton... per la linĉo.

Skot Niring reproduktas en sia libro eltirojn el la granda informa gazetaro, kiuj priskribas plurajn el tiuj ĉi abomenaj spektakloj. Jen specimeno:

"Colon post colo la negro estis mortkuirata. Ĉiujn kvin minutojn freŝaj folioj estis ĵetataj sur la ŝtiparon, ĝis la fajro atingis lian trunkon. Kiam la flamoj konsumis lian ventron, viro el la popolaĉo antaŭenpaŝis kaj verŝis esencon sur lian korpon. Post kelkaj minutoj la negro estis transformita en cindron..."

Ripetu ni, kion ni ĵus antaŭe diris: inter la rigardantoj troviĝas virinoj kaj infanoj. Leginte la libron de Skot Niring, oni estas plenigita de naŭzo, indigno, furiozo. Oni sentas naŭzon rigardante tiujn ĉi "heroaĵojn", kiuj servas kiel manifestacio al unu el la plej stultegaj kaj plej abomenaj ŝovinismoj.

Oni sentas honton kaj konfuzon aparteni al raso, kiu plenumas similajn abomenaĵojn... je la nomo de la civilizo.

L. Lora,
El "Monde" trad. N. B.



EL ALĜERIO

Lastatempe okazis ĝenerala striko, kiu estis la plej impona, la plej belega en la historio de la alĝeria sindikata movado, ĉar ĝi klare montris la reviviĝon de la klaskonscio ĉe la subpremataj popoloj kaj la firman decidon de la indiĝenoj unuiĝintaj kun eŭropanoj, kontraŭbatali la francan imperialismon, kiu hontege ekspluatas ilin depost baldaŭ 100 jaroj.

5000 araboj, senrajtaj proletoj, havenlaboristoj, forte unuigitaj en sindikato, strikis por pli bonaj salajroj en Oran, Arzew (Arzeŭ), Beni-Saf kaj Mostaganem. 26. fr.[1] potage sur la ŝipoj, 23 fr. tere — jen la malsat-salajroj, kiujn oni donis al ili kiel pagon por peniga laboro. 35 fr. potage sur la ŝipoj, 32 fr. tere — jen la justaj salajroj, kiujn postulis tiuj sklavoj.

Jam la 1-an de majo en Oran ili amase ne laboris, protestante kontraŭ sia mizera stato. Post tiu 24-hora striko, post tiu impona manifestacio, la mastroj, esperante trankviligi ilin kaj timante la fortan sindikaton, akceptis plialtigon de la salajroj je kelkaj centimoj. Almozdono, al kiu la haven-laboristoj unuanime respondis per definitiva striko. Ĉiuj iris al konkiro de viv-rajtoj kaj, mirinda fakto: estis la araboj mem, ili, kiujn aparta leĝaro perforte silentigas, kiuj gvidis tiun movadon. Tio estas pruvo de la forta decido de l' araboj, liberigi sin el la ungegoj de la franca imperialismo. Pro tio oni prave diras: "La striko de la arabaj haven-laboristoj estas simbolo".

Komprenante, ke la venko en tiu striko havus grandan reefikon sur la mondon de l' laboro en Alĝerio, ĉio estis uzita por ĝin malsukcesigi. Dum en la interno de la departemento oni dungis arabojn por anstataŭi la strikantojn, ĉe la havenoj mem mastroj, indiĝenaj preferatoj, marabutoj (mahometanaj religiuloj) kune agadis. Al eŭropanoj oni diris: "Forlasu la indiĝenojn kaj vi estos pagataj per 40 fr. tage." La indiĝenaj intelektuloj agis por disigi arabojn kaj eŭropanojn; al la arabaj strikgvidantoj ili promesis grandan sumon, se la havenlaboristoj reirus malvenke al la laboro. Tiuj metodoj malsukcesis. Finfine oni perfortis la strikantojn pli kaj pli batalemajn: aroj da policistoj ĉeestis antaŭ la laborborso kaj okazigis disput-konfuzon, okaze de kiu la 2 eŭropanoj-gvidantoj, K-doj Sastre kaj Torrecilas, estis arestataj kun 10 araboj kaj 2 ŝtatmaristoj de la militŝipo "Lorraine" (elp.: Loren), kiuj solidariĝis kun la strikantoj. Oni tiele pensis neniigi la strikmovadon. Sed malgraŭ la provokoj, malgraŭ la arestoj la batalemo de la strikantoj ĉiam ampleksiĝis. Kiam ĉio malsukcesis, oni

[1] 1 dolaro = 25 fk. fr.

uzis la plej hontan rimedon: la aĉaj "marabutoj", sciante, ke la araboj estas fanatikuloj, ordonis al ili reiri la laborejon je la nomo de dio. Tio estis la fino de la striko; malvenke ili ĉiuj obeis.

Jen do dum tiuj 14 tagoj da batalo ĉion oni uzis kontraŭ la araboj: la putrigon, minacadon, provokojn kaj finfine la dian ordonon. Ĉiuj helpis al tiu malvenko: la mastroj, urbestraro, policistoj kaj la reprezentantoj de la dia volo, la marabutoj.

La 8-an de julio la arestitoj estis kondukataj antaŭ la juĝistojn en Oran. Oni postulis kiel punon ĉu 7 jarojn da mallibero, ĉu du jarojn da mallibero kaj 5 jarojn da resto-malpermeso. Simpatiante al tiuj K-doj, solidarece kun ili, 3 semajnojn post la malvenko la havenlaboristoj strikis 24 horojn. Ne unu el ili laboris tiun tagon: ili ĉiuj estis antaŭ la juĝ-palaco, ili ĉiuj konkiris la straton, ĝis kiam ili sciis pri la puno, malgraŭ la policistaĉoj kaj la soldataro. Kaj la juĝistoj, komprenante kaj timante la koleron de tiuj proletoj, ne juĝis, kiel oni postulis. Sastre kaj Torrecillas estas kondamnitaj nur je 10 monatoj da mallibero kaj la aliaj profitis la prokrastpermeson.

"Ĉiam Antaŭen", Alĝero.

La Laborista Problemo en Usono

(6-a daŭrigo. Vidu n-ojn 250—256)

Ford kontrolas la vivmanieron de laboristoj siaj

Tuj, kiam laboristo estas dungata ĉe Ford, li ricevas hejme viziton de inspektoro; li devas doni informojn pri sia aĝo, sia religio, sia familia situacio, la nombro da personoj, kiuj ricevas per li vivtenadon, siaj kutimoj (ĉu li drinkas? ĉu li fumas? ĉu li ludas?). Li devas ankaŭ sciigi la sumon de siaj ŝuldoj, kaj la nomon de siaj kreditoroj, la sumon de sia ŝparita mono, kaj la bankon, en kiu ĝi estas deponita, kaj fine la sumon de sia asekuropoliso, se li havas tian. La inspektoro vizitas poste la loĝejon por noti la nombron el ĉambroj, la metodojn de lumigo kaj de hejtado, kaj por taksi la valoron de la meblaro. Li daŭrigas sian enketon ĉe la najbaroj por kontroli la deklarojn de la laboristo kaj ricevi novajn informojn pri liaj vivkutimoj. Se la moraleco de la observata laboristo plaĉas al la moralaj konceptoj de sinjoro Ford, oni konsentas al li la duan parton de la salajro. Se, kontraŭe, li loĝas en malpura kaj malsaniga domo, vivas kun virino, kiu ne estas lia edzino, elspezas ĉion, kion li havas, konservas hejme sian ŝparitan monon, anstataŭ meti en bankon aŭ eĉ, — superega krimo, — pruntedonas monon al iu kamarado, mankon suferanta, ne postulante iun garantion, se, unuvorte, li malobeas la moralan kodon de la puritanaĉa burĝo, li ne ricevas la duan parton de l' salajro. Kompense, li ricevos de nun, ĉiusemajne, la viziton de la inspektoro, kiu konsilas al li ŝanĝi sian vivmanieron, kaj kontrolas lin rigore. Se li cedas al la prudento dum la monato, oni redonas al li la tutan retenitan sumon. Se lia agmaniero ŝanĝiĝas nur post du monatoj, oni redonas al li nur 75% ... post tri monatoj 60%, post kvar monatoj 50%, post kvin monatoj 25%; post ses monatoj, se li persistas en sia eraro, la malbonekzemplulo estas forigata.

Ĝenerale, li memvole foriras antaŭe, ĉar la normala salajro de nekvalifikita laboristo (2 dolaroj 72) ne sufiĉis, eĉ dum 1914, por vivigi familion. Inter la laboristoj, al kiuj la dua salajrparto estis malkonsentata dum 1917, 41% ne estis ŝparemaj, 19,7% loĝis en malsanigaj domoj, 7,1% liveris erarajn informojn pri sia vivo, 9% pruntedonis monon sen garantio, 3,6% havis malbonajn vivkutimojn, 1,8% vivis kun virinoj, ne edziĝinte; 1% konservis sian monon hejme, anstataŭ deponi ĝin en banko.

Obeemaj ekspluatatoj

Dank' al tiu metodo, Ford sukcesis maksimumigi la malŝanĝemon ĉe siaj laboristoj kaj konsistigi por si tre obeeman manlaboron (neniam li havis strikon, nek ian tumulton). Depost 1914 la "moralo de la laboristoj progresis mirinde, kaj kiam dum 1923 ĉiuj laboristoj ricevis partoprenrajton en la profitoj, tiu ĉi estis definitive enkalkulata suplemente en la salajro. La sola afero, kiu daŭras el la priskribita organizado, estas do la ofico de la inspektoro, kiu daŭras kontroli la laboristojn. Tiuj ĉi vivas hodiaŭ en propraj, sanigaj domoj, ŝparas, deponas monon en banko, sin detenas de ĉiu, revoluciema aŭ ne, ideo, kaj dividas sian libertempon inter la sportoj kaj la fotografio; la verko de edukado (kelkaj diros: de malspritigado) entreprenata de Ford sukcesis do komplete.

La direktado super la dungitaro, ĉiel, estas nur la logika ĝeneraligo de la Telora sistemo: dum Telor sciis okupi la laboriston, la modernaj ĉefoj de la dungitaro rekonis la psikologian faktoron de la fundamenta unueco de la homa vivo; ili celas sekve kontroli la tutan vivon de la laboristo, kaj krei la materian, psikologian kaj moralan medion, plej taŭgan por faciligi grandan produktkapablon. (Finota)

Kompiltrad. de Alĝeraj Esperantistoj.

Havinda eldonaĵo de SAT estas

Prologo

Poemaro originala de **E. Mihalski**
64 pĝ. kun titolbildo
Mirinde fluaj k graciaj lirikaj versoj.

Prezo: **0.70** mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

PRI KLASBATALO

Sub tiu titolo aperis en n-o 248 artikolo de K-do 14 157. En Ruhrregiono ni spertis la samajn faktojn, kiujn tiel klare priskribis la K-do el Krimiĉaŭ. Ĉiu ja konas laŭ propraj spertoj, kiel nun aspektas la t. n. "sociaj akiroj". Ni menciu la kaŭĉukan 8-horan labortagon, kiu jam fariĝis tiel elasta, ke ĝi fakte superegas la 12 horojn. La labortribunalo estas same severa kaj malmola kiel polica gumbastono; ĝi malofte trafas la burĝon. Pri multo detala ni povus plendi, sed temas kritiki la sistemon.

Pli ol dek jaroj jam pasis post la germana revolucio kaj dum tiu tempo mizere ni vivis atendante la socialismon. Jen la klasbatalo estas entombigata apud la socialismo kaj sur la du tomboj la meti-sindikatismo starigis sian regadon sub la devizo "Interklasa kunlaborado". La laboristoj ne plu bezonas striki, sed nur glui kotizmarkojn. La porsalajra batalo estas plenumata de la gvidantoj, la t. n. "bonzoj" ĉe la intertrakta tablo.

Samtempe nenio restas neprovita por ligi la laboristojn al la ŝtato. Dekomence metiaj sindikatoj estas nura relativa limigita rimedo por kontraŭi la senĉese kreskantan mizeron proletaran interne de la malnova sistemo. Ili pli malpli bone plenumis sian taskon kiel vendistoj de l' varo laborforto kaj tiel venkis super iuj entreprenistoj. Sed la hodiaŭa tempo de l' monopole progresinta kapitalismo ĉiam pli intense puŝas al la bazon ŝanĝanta punkto. Per tio la proletaro estas metata antaŭ novajn problemojn.

Necesas forigi la "bonzojn" kaj anstataŭigi ilin per aliaj, — oni ofte aŭdas paroli. La heroeco de la pasinta epoko speguliĝas ankoraŭ hodiaŭ en la kredo je la granda laborista savonto. En tiu idealista medio jam dum jarcento evoluas la prospero de l' profesia gvidantaro. La malnovaj sindikatoj, antaŭe porlaboristaj, fariĝis, ne perfide, sed nature — porgvidantaj, kaj iom post iom rimedoj de ilia instinkto de sinkonservo. La organizsistemo konstruita laŭ burĝa idealo donis al la "bonzoj" pli kaj pli ĉiujn spiritajn kaj materiajn influojn. Ĉiu klopodas plibonigi sian ekzistadon. Sed ni scias, ke tio estas burĝa fiagado, se ĝi okazas je kostoj de l' membroj, de l' klaskamaradoj. Ŝarĝite per etburĝaj pensoj kaj eduke enplantitaj vivmanieroj ni enmarŝas la kampon de la proleta klasbatalo. Kaj ankaŭ la gvidantoj ne estas liberaj de tio malgraŭ siaj teoriaj ekkon-kapabloj.

Konsiderante, ke ni, kiel ili, estas produkto de la burĝa sistemo, malsukcesas nura ŝanĝo, ĉar temas ĉiurilate ŝanĝi la organizsistemon. La tuta sindikatara instalo estas ankoraŭ konforma al la prospera periodo kapitalisma, kiam necesis kontraŭstarigi al la entreprenistoj produktteknike ankoraŭ ne kunligitaj laboristan movadon salajre apartigitan laŭ metioj. Se la sindikatoj pro sia historia evoluada profesi-dispartiĝo estas netaŭgaj por la moderna proleta klasbatalo, en kia formo do devus okazi la kuniĝo de la laboristaj amasoj? La nunaj produktad-cirkonstancoj respondas al ni klare kaj koncize. La metioj foriĝis.

aperis la fabrikoj, en kies laborejoj ĉiu laboristo plenumas sian laboron meĥanike laŭ Fordsistemo.

Ĉi tiuj laborejoj donas al la laboristaro la necesan potencpozicion, se ĝi enradikas sian klasbatalan organizon en la produktejon. En la laborejo la proleto konscias, kian sklavan rolon li ludas. Tie li interrilatas kun same ekspluatataj kolegoj kaj nur en laboreja organizo la laboristaro povas esti edukata kiel klaskonscia batalantaro por komunista sociordo.

Jen laborejaj organizoj mondskale unuigitaj en unu sola industri-unuiĝo ĉiutempe ebligas al laboristoj forigi netaŭgajn gvidantojn. La laborejo de la ekspluatado estas la loko, kie naskiĝas la klasa solidareco. La fabrikoj ludas tian gravan rolon en la klasbatalo, ĉar la kapitalistoj aŭ la monopolista kapitalismo ne plu estas organizitaj laŭ profesioj, sed laŭ fabrikoj. Antaŭ ne tre longa tempo la kapitalista koncentriĝo estis aparte progresanta laŭ profesioj: izolaj estis maŝinfabrikoj, minejoj, elektraj centrejoj ktp. Sed la nuna kapitalista organizado estas alia. Oni kunligis diversajn specojn da produktejoj en unu komunan kadron. Ofte oni ignoras profesiajn partojn kaj akceptas nur tiujn, kiuj estas profitdonaj.

Ĉiu konas la Unuigitajn Ŝtalfabrikojn, petrol-, farb- kaj ceterajn industriojn. Ili kunigis minejojn, metalfandejojn, fervojojn, havenojn, elektrajn centrejojn ktp. Tiele estiĝis la trustoj, sur kiuj sin apogas la profitreĝimo. Do, ĉar la laborej-organizo estas la formiĝo de la moderna kapitalismo, ĉar la potenco de la ekspluatistoj kuŝas en la gigantaj laborejoj, tial la laborej-organizo ankaŭ devas esti la koncentriga forto de la moderna proletaro. La tutmonda laborista klaso travivis revoluciojn, kiuj malkovris kaj renversis la ideon kaj strukturon de la malnova laborista movado. Ankaŭ la monopolista kapitalismo al ni klare montras la organizformon, kiun bezonas la tutmonda proletaro por finvenki la kapitalismon. Laŭ metisindikatoj ordigitaj la proletoj ne batalis sur la barikadoj, sed kiel klaso ili batalis veninte de la laborejoj. Nur la propra forto de l' proletaro organizita en la laborejo laŭ konsilantara sistemo, povos detrui efektive la kapitalisman sociordon.

H. Falkenherr (10084),
Dortmund (Germanio).



VIKTIMOJ DE LA LABORO

La sekvantaj nombroj rilatas al statistikoj faritaj de la asekur-societoj kontraŭ akcidentoj en Germanio. Ili spegulas la tutan tragedion de la milionarmeo da laboristoj. La nombroj eĉ ne atingas la altecon de tiuj cititaj en la Statistika Jarlibro.

Laŭ la citoj de la profesiaj asekur-societoj la nombro de la anoncitaj akcidentoj kreskis kontraŭ la jaro 1926 kun 614 903 akcidentoj ĝis 852 484 en 1927. En la jaro 1927 sekve 38,63% pli da akcidentoj estas anoncitaj, ol en 1926. La nombro de la laborejoj, kiujn priservas la 66 profesiaj asekur-societoj, estis en 1926 — 854 306 laborejoj kun 9 162 443 asekuritoj. En 1927 estis 907 269 laborejoj kun 10 698 703 asekuritoj. La nombro el asekuritoj pliiĝis do je nur 16,87%. Pli ol 60-homaj vivoj ĉiutage mortas en Germanio sur la batalkampo de la Laboro.

La profesiaj asekur-societoj donas simplan klarigon por la pliiĝo de l' akcidentoj. Laŭ ilia opinio tio estas la rezulto de leĝo decidita en 1925 pri aliigo de la kontraŭakcidenta asekuro. Laŭ ĝi ĉiuj akcidentoj, eĉ la plej malgravaj, devas esti anoncataj. Kiel pruvon ili argumentas, ke la kompensitaj akcidentoj malkreskis kompare kun 1926.

Ĉiu, kiu jam rilatis kun la profesiaj societoj, scias, kiun kaŭzon havas la regreso de la proakcidentaj kompensitoj. Per la plej granda ruzo estas rifuzata la malgranda rento al la akcident-vunditoj.

La pliiĝo de l' akcidentoj havas sian kaŭzon unuavice en la pliakriĝo de l' ekspluata sistemo, la misuzo de la laborforto, la raciigo. Laŭ la raporto de la Regna Kredit-Oficejo depost 1925 ĝis 1927 estas konstatebla pli ol 25-elcenta pliiĝo de la labor-intenseco kaj produktokvanto.

Kompreneble laŭ la raportoj de la profesiaj societoj la laboristoj kulpas pri la akcidentoj. Ili kredeble sentas sin pli feliĉaj, se ili havas difektitajn kruron, brakon aŭ alian korpoparton, ol se ili havus sanajn membrojn. Oni devus puni la entreprenistojn, kiuj per sistema pelado kaj incitado instigas la laboristojn malatenti pri la kontraŭakcidentaj protektiloj. Vere kontraŭbataleblaj estas la akcidentaj danĝeroj nur per plibonigo de l' salajr- kaj labor-kondiĉoj.

Skoghall en Svedio kaj ĝia esp. movado

Skoghall kuŝas sur insulo nomata Hammaron ĉe la norda bordo de la lago Vänern. La provinco estas nomata Värmland. Skoghall estas nun tipa industriloko, sed antaŭ kelkaj jaroj troviĝis nur iuj kamparanoj sur la orienta parto de l' insulo, kaj sur la loko, kie nun staras la fabrikoj, oni povis vidi nur nudajn rokojn kaj inter ili iom da arbaro. Per usona rapideco la fabrikoj estas konstruitaj, kaj tiuj kune kun la aliaj konstruoj abundas. Troviĝas du celulozfabrikoj, kiuj jare produktas kun 70 000 milkilogramojn; ankaŭ silkcelulozo estas produktata. Elektro-kemia fabriko

---

EL REVOLUCIO DE 1905 EN RUSIO

Estis neĝvento. Ventego kirlis la neĝon, ĵetis ĝin supren kaj malsupren, antaŭen kaj malantaŭen. Vesperiĝis. En la vilaĝo Miĥajlovka la vilaĝano Mikaelo Terpigorev de tempo al tempo eliris el sia kabano sur peroneton, sed ĉiam returniĝis balancante per la kapo. Fine li ekbruligis lampeton kaj sidiĝis apud tablaĉo. Mario, lia edzino, sin sidigis apud li kaj komencis fliki disŝiritan ĉemizon. La lampeto fumaĵis. Mario, por vidi, klinis la kapon. Lenĉjo, ilia fileto, estis sur rusa forno kaj rigardis sian patrinon, degelintan fenestreton. Post la fenestreto sonis bruego, oni aŭdis, kiel la vento frapis pajlon, deŝirante ĝin de l' tegmento. Anguloj de l' kabano kovriĝis per prujno. Lenĉjo deziris tuŝeti ĝin per fingreto, sed tie estis tre malvarme kaj sur la forno tiel varme, kaj li forturnas sin kaj ekdormetis.

Subite li vekiĝis. Li ekaŭdis voĉojn. Parolis iu vilaĝano, kiu purigis sian peltaĉon kaj piedvestojn de neĝo. Lia barbo kaj lipharoj estis kungluitaj per glacio. "Nu, vetero! Apenaŭ ne frostiĝis! Ankoraŭ matene estis grize! Mi, el Maslovki iris!"

"En urbon?" "Jes, tien."

La vizaĝo de l' pasanto estis sulkigita, sed vigla kaj moviĝema. Haroj longaj kaj grizaj. Li parolis per nelaŭta voĉo, helpante sin per belaj movoj de l' brakoj. Mikaelo, nudpieda, kun malkovrita brusto, sidis, apogante sin sur tablon per la kubutoj kaj kun intereso esploris la maljunulon.

"Vi subbruligis, ĉu?" "Jes! Skribu, for!" malmole diris la pasanto. "Ĉi tiu bienposedanto, Tolopov, neniam hejme vivis. Ĉiam li veturadis, la diablo scias, kien. Sed nun li alveturis. Geservistoj ĉe li tre multaj! Ha! por hundo li dungis specialan serviston, kiu kun la hundo iradis por promenigi lin!... Domego — ho!... Unu fenestro — cia kabano trapasus!... Pargeto, speguloj, pentraĵoj en oraj kadroj!"

"Vivis — ne malĝojis", aldiris mallume Mario.

"Pri kio malĝoji tiuokaze?" diris Mikaelo, disblovante la naztruojn.

"Post tia vivo en paradizon eĉ mi ne ekvolus...!" diris la pasanto ridante kaj ektusis.

"Ha! Paradizo!... Ilia brutaro: ne bovino — bestego! Bovo — beleco! Kokinoj!! anseroj!!" — "Iliaj porkidoj vivas pli bone, ol niaj infanetoj," — ree diris Mario.

"Vere, verege ci parolas. Niaj vilaĝanoj unufoje ekdiskutis kun la administranto kaj kriis al li: 'Vi por viaj porkidoj konstruis palacon, kaj niaj infanoj en fumaj kabanoj mortas. Vi konsideras niajn infanojn pli malbonaj ol viajn porkidojn!' La administranto estis kiel porkviro: dika kaj grasa. 'La porkidoj, li diris, estas ĝentilaj, anglaj rasoj. Ili postulas vartadon.' Jen, kiel estas! Vartado! Kaj la infano kreskas simile al lolo sub barilo."

La pasanto malmulte silentis kaj subite sin turnis al Mario, akre demandante: "Nu, mastrineto, ĉu ĉiuj infanoj ĉe ci estas vivaj?"

Lenĉjo ekvidis, kiel la vizaĝo de lia patrino ektremis kaj ŝi mallaŭte respondis: "Dum pasinta somero mortis knabineto. Bonega estis... Ĝis nun mia koro doloras."

"Mortis," — subite aldiris Mikaelo. "Ludis la infanoj apud fervojo, kaj ĝi surrampis sur la relojn. Ĉu multe ĝi havis da racio?... Vagonaro..."

"Nu?"

por produktado de kloro kaj natro; granda segejo, rabotejo, alkoholfabriko kaj specialfabrikoj por la utiligo de l' kromproduktoj. Krom tio estas konstruata paperfabriko produktonta jare 20 000 milkilogramojn da papero. La loĝantaro estas proksimume 4 mil kaj la vira parto estas preskaŭ senescepte organizitaj sindikatanoj. La meza salajro estas ĉ. 100 svedaj kronoj (= ĉ. 28 dol.) dusemajne. La vivkondiĉoj estas tre bonaj, rilate al la aliaj laborpagoj en la provinco. Kaj kiel natura sekvo el tio la diversaj organizoj havas bonan nutradon. Da organizoj troviĝas ĉi tie socialdemokrataj, komunistaj, anarkistaj, kontraŭalkoholaj, religiaj k. a. Feliĉe la laste menciita speco ne multe progresas. Krome ni havas kooperativan movadon, kiu indas apartan priskribon.


La esp. movado ĉi-loka estas tre juna. Iniciate de pastro J. Lindberg la unua kurso komenciĝis aŭtune de 1926. Aliĝis 20 partoprenantoj, sed restis fine nur 4. Venontan aŭtunon li denove kunvokis la interesatojn kaj gvidis vintre kurson, kiun partoprenis 8 lernantoj ĝis la fino. 2 kursoj okazis pasintan studsezonon kun 16 lernantoj. J. Lindberg estas la pioniro de esp-o en Skoghall, kaj certe sen lia propagando kaj sperta gvidado eĉ ne unu esperantisto troviĝus en Skoghall. Du K-doj, kiuj partoprenis la 8-an Kongreson en Göteborg, SAT-aniĝis kaj komencis funkciigi SAT-rondon. Dum majo K-do Soares el Portugalio gvidis 2 perfektigajn kursojn. Pro lia restado nia rondo ricevis la necesan antaŭenpuŝon, kaj ni ŝuldas al li multan dankon pro lia ĉiama agitado por SAT kaj ĝiaj gazetoj. Nun estas 18 SAT-anoj ĉi tie, el kiuj 17 abonas "S-ulo"-n kaj 7 "La Novan Epokon". Dank' al ŝtatsubvencio nia libroĉambro havas jam 50 esp. volumojn. En septembro la grupo aranĝos ekspozicion.

SAT-ano 13 191.

EN GERMANA KURACLOKO

Nur malfacile kaj kvazaŭ hazarde malsana proleto ricevas konvenan helpon fare de la asekurkasoj, laŭ la kategorio de sia malsano. Kvankam mi depost kelkaj jaroj estas nervomalsana kaj katarsuferema, mi nur nun fine sukcesis trovi kuracadon en banloko.

En la famekonata urbo Vajmar (Weimar), kie vivis kaj kreis Ŝiler (Schiller) kaj Göte (Goethe), ĉarme lokita en la mezo de Germanio, mi ŝanĝis la rapidvagonaron, por atingi post mallonga veturo per simpla vagonaro la banlokon Zulca (germ.: Sulza) apud la rivereto Ilm. Post elvagoniĝo kun nur malmultaj aliaj pasaĝeroj, min akceptis preskaŭ tute verda, belega intermontara regiono. Nelonge post la forlaso de l' stacidomo mi konstatis je la maldekstra supraĵo sur kampodomo nomata "Kornika Dometo" flirtantan reakcian "nigra-blanka-ruĝa"n standardon, la emblemon de l' iama germana imperio, sufiĉe karakterizan por la ĉi tie reganta spirito. Post 15-minuta marŝado tra bone kulturitaj vojetoj mi alvenis ĉe privata loĝejo gasteme invitanta min, apud la urba kurac-parko, kie samtempe mi renkontiĝis kun kvin aliaj malsanemaj kaj palaspektaj proletoj el diversaj regionoj.


Kuracloko Zulca (Sulza). — Produktejo de kuracsaloj.

Restadejo por bonŝancaj proletoj

Diversdimensiaj loĝejoj estas tie haveblaj, ĉambroj kun malmultaj aŭ multaj litoj. Laŭkontrakte la banloka direkcio disponigas proksimume 600 litojn por malsanaj proletoj de l' fervojoj, minejoj, fabrikoj ktp., kiuj membriĝis ĉe la asekuraj kasoj. Krom tio estas lueblaj ĉambroj kun diversgrada komforto, kun kaj sen pensiono, laŭ tarifo havebla ĉe la administracio. Oni povas havi pensionon jam por mk. 4—4,50 tage (= 1 dolaro), kun plikariĝo je 25% en la monatoj julio kaj aŭgusto. Sola lito sen pensiono kostas mk. 1,50—2,00 po tago. La diversspecaj diagnozoj diferencas kompreneble laŭ la pacientoj, kiuj ĉiuj esperas resaniĝi. Unuavice plej multnombraj estas nervomalsanuloj, poste sekvas kataruloj, stomaksuferantoj, reŭmatismuloj k. a.

Aplikiĝas la salakvo kontraŭ astmo, anemio, skrofolo, artrito, neŭrastenio kaj ĉiaspecaj akcident-malsaniĝoj. Laŭ kategorio specialiĝas ĉiu kliento. Meritas mencion inter la institucioj unuavice la "inhalejo" (enspirejo), bele lokita meze de l' parko, sur kies tegmento en sama reakcia spirito flirtas la imperia (monarkista) germana standardo, refoje simboligante la politikan spiritostaton de l' ĉi tie regantaj rondoj. La "inhalejo" kuracas individue laŭ diversaj plej modernaj metodoj, enspiro per la nazo, buŝo, laringo, per oksigenaj enspiriloj ktp. Apude zorgas legejo kun nur

---

"Jen... Mia Mario, alkurinte, perdis konscion kaj falegis. Oni scias, ke okazus inspekto..."

La lipoj de Mikaelo tremis.

"Juĝesploristo alveturis... Esplordemandis... Ĉu ne intence ni submetis ĝin sub vagonaron..." Li kolere svingis per mano...

"Kaj mi pri ĉio tio" — subite kun ploro en la voĉo ekkriis la pasanto... "Tie porkidoj, kokinoj! Hundo kune! Li, Tolopov, deziras dum vintro manĝi fragojn. Por tiu celo li havas varmbedojn sub tegmento... Dum kristnasko li alvokis al si gastojn. Ĝuste por tio li bezonas fragojn. Ja ilia ventro ne kontentiĝas per nura pano. Dum karnavalo, kiam ĉirkaŭe neĝo kuŝis, neĝvento blovis, li... manĝegis kukumojn..."

"Kaj ni pajlon de l' tegmento formetis kiel manĝaĵon por la bruto", — diris mediteme Mario.

"Jen, karulino! Ci kalkulu, kiom da manoj laboras, perdas sanon, por ke Tolopov povu manĝegi dum vintro fragojn kaj veturadi sur varmaj akvoj. Nu, li manĝegas. Li zorgon ne havas!... Ci sinjoron Akcipitron konas? Liaj grenejoj estas plenaj da greno apud ni. Kaj ni mortadas pro malsato, ni ne povas trovi eĉ unu greneron..."

La pasanto kapbalancis.

"Komunume dividi la tutan grenon, tio estos laŭ justeco," — pasie diris Mikaelo.

La vizaĝo de Mario ekruĝiĝis. "Dividu!" — ŝi diris sin levinte. "Kion ci atendas? Por mortaĉi? Nelonge bezonas atendi..."

Mikaelo ekvolis fumi. Li deŝiris peceton da papero, sed tabakon ne havis... Kolere li forĵetis la paperon kaj tabaksaketon...

"Mia filo..." diris la pasanto... "Niaj vilaĝanoj longe malsategis. Fine ili kolektiĝis... Ekbruligis faskon da pajlo... iris al Tolopov, al biendomo... Mia filo, Paŝa, diris al mi: "Paĉjo! Ĉiuj iris, iros, kaj ni serĉos justecon..." Ni nin vestis, ŝuojn surmetis... Homamaso plimultiĝis... Alvenis al la biendomo... Oni devas kompreni... Ĉiuj malsategis... Pro ŝuldoj de imposto... Multajn inter ni oni enkarcerigis... en malvarman ĉambraĉon, kvazaŭ haringojn en barelo... Nek stari nek sidi... Aero mankas... Spiri oni ne povas. Kaj la estro levis la lipharojn kiel blato kaj diris: 'Ne, grandaj sinjoroj, oni povas staradi.' —"

"Nun, kiam alvenis ĉiuj al la biendomo, ili freneziĝis... Mi rigardas. Flamo brulegas... Ĉio polviĝis... Kaj matene mi aŭdis: Soldatoj alvenis... Ĉiuj eliris. Oni la soldatojn vicigis. Ili levis siajn pafilojn... Virinoj ekploregis... Viroj kriegas: 'Donu panon! Per kugloj ne nutru nin'!"

"Mi rigardas — juna soldato... Similas mian filon Paŝan... Ne, mi pensis, li ne levos sian brakon... Sed, mi vidas, la oficiro svingis per naztuko... Paf — paf!"

En la kabano ekregis silento. Oni aŭdis la neĝon frapantan al la fenestro. Mikaelo severe rigardis sur la teron kaj ofte movetis makzelon.

"Bonega estis mia filo, juna, gaja, laborema. Oro — ne filo. Jes, la ĝojo estis mallonga, sed la malĝojo longega! Mi maljunulo restis viva, sed kuglo atingis lin... Nu, maldolĉe estis por mi... Sed kiam oni kvietigis nin... Mi estis ĝoja pri Paŝĉjo... Sen turmentoj li mortis. Ha! kiom da homoj oni turmentis...

El rusa lingvo trad. R j a b u h i n (4880).

burĝaj ĵurnaloj kaj gazetoj pri la distro de l' klientoj.

La agrabloj de l' resaniĝado

Proksime de l' stacidomo leviĝas tri grandaj salejoj ("gradirdomoj"), kie la salakvo saliĝas per vaporigo), de sur kiuj malsuprengutas ĉiutage 750 kubikmetroj da salakvo 12—27%-a. Ĉirkaŭas la gradirdomon "Luize" granda malfermita kaj aerumita koridoro, kiu estas ĉie ŝirmita kontraŭ la klimat-diferencoj. Jen bona inhalejo por dumhoraj restadoj, enspirado kaj gimnastiko. Enkonstruita porkuŝa halo donas okazon por laŭvola ripozo. Precipe profitas tiun okazon gastoj de la burĝa klaso. Kvarfoje semajne de la 16-a ĝis 18-a horo koncertas muzika orkestro senpage je la dispono de l' pacientoj.

Salakvaj banoj estas liverataj laŭ la receptoj de l' kuracistoj speciale: "kun acido kaj konifera ekstrakto" en la banaj instalaĵoj. La trinkhalo disdonas senpage kaj ĉiutage diversprocentan salakvon regule de la 7½-a ĝis 8½-a kaj de la 18-a ĝis la 19-a h.

La favora lokiĝo de l' banloko, ĉar ne ekzistas fabrikoj kaj laborejoj malsanigaj, sed pro salakvo kaj konifera bonodoro pura aero, promesas al ĉiuj pacientoj, ĉu forte aŭ malforte suferantaj, resaniĝon, aŭ minimume pliboniĝon de ilia sanstato. Malsanaj Gek-doj, malsanemaj laboristoj kaj metiistoj, ekspluatataj en ĉiufakaj laborejoj, nepre devas postuli restadon en resanigejo por fortigi siajn korpon kaj menson.

Tro rapide forflugis mia unumonata restado en tiu resanigejo, kvazaŭ febra sonĝo. Ree en mia grandurba loĝejo kaj polvoplena laborejo, mi spertos verŝajne la maldaŭremon de mia resaniĝo. Ni batalu por plena forigo de la malhigienaj vivkondiĉoj! Tiam ni ne plu bezonos kuracejojn, kiuj nur dumtempe povas efiki je la sanstato, sed ne neniigas pordaŭre la malsanojn kreskantajn kaj prosperantajn en proleta mizervivo. (265)

"POR NOVA MORARO"

La murgazeto de l' kvina etaĝo

En "La Lernanto" n-o 5 (majo 1929) oni povis legi koncizan klarigon pri la vorto "murgazeto" al unu demandinta K-do. Certe ekzistas multaj aliaj K-doj, kiuj neniam antaŭe aŭdis ion pri la signifo de l' murgazetaro en Sovetio. La sekvanta priskribo el praktiko povas doni al niaj legantoj sufiĉe klaran imagon pri tiu objekto. La subtitoloj estas niaj.

Red.

La unua regiona (kelk-gubernia) konsiliĝo de laborist-kamparanaj korespondantoj donis kiel decidon la agitvorton: ĵurnalojn kaj gazetojn pli proksime al la amasoj!

Se oni en la laborejoj kaj fabrikoj la centron de la laboro kun murgazetoj transmetas en la korporacion, en la ĉeneron, tiam la murgazetoj de loĝbienaj aŭ loĝkonstruaj kooperativoj devas plenumi la saman laboron en domo kaj eĉ en aparta etaĝo de granda domo. La lab.-kamp. korespondantoj de l' Moskva-Narva regiono de la urbo (Leningrado) komencis jam praktikan plenumadon de tiu ĉi decido. Ne pasis monato, kiam la regiono havis jam 70 domajn kaj unu etaĝan murgazetojn.

La vivo kaj batalo de tiu ĉi etaĝa murgazeto meritas apartan atenton, ĉar ĝi antaŭanoncas decidan transformon de l' moraro en tiu domo.

Ĝi havas la nomon "Por nova moraro". Ĝi naskiĝis dum la unua konsiliĝo en kvina etaĝo de la domo n-o 11 en Narva-stratego de Leningrado. Ĝian naskiĝon eldevigis akra batalo kontraŭ malutilaj elementoj inter la loĝantaro de l' domo, kontraŭ kiuj ne povis helpi nek decidoj de la komunaj kunvenoj de domloĝantaro, nek punoj de la milicio.

La ekscesuloj de la domo n-o 11

La domo n-o 11 en stratego Narva havas 930 loĝantojn, el kiuj 453 estas gelaboristoj kaj 103 senlaboruloj. Ĝi akiris al si malbonan famon: en ĝi loĝadas multe da ekscesuloj[1] kaj diboĉuloj, kaj ĉiujn antaŭis, rilate al ekscesemo, la kvina etaĝo de la domo. Tie ĉiam estis la infero: drinkoj, diboĉoj, ludkartaro, insultoj, malĉasteco neniam ĉesis, nek dum la tago, nek dum la nokto, nek ĝis la ricevo de l' labormono, nek post ĝia ricevo. Oni ĉion faris tie malkaŝe kaj al ĉiuj, kiuj kuraĝis ion kontraŭfari, minacis la trančilo. La etaĝon malliberigis la ekscesuloj. La vivo en ĝi fariĝis netolerebla.

Sed jen aperis la unua numero de la etaĝa murgazeto. Al ĝi apenaŭ iu donis atenton. Post semajno aperis dua numero. Tiam komenciĝis jam la paroladoj. La murgazeto starigis kiel sian taskon, organizi moraran anguleton en la kuirejo kaj atingis tion. La loĝantaro partiiĝis je du partioj: por kaj kontraŭ la murgazeto.

La murgazeto kiel edukilo kaj batalilo

Numero tria eliris denove post semajno. Ĉirkaŭ ĝi oni jam arigis la aktivulojn, kaj ĝi atakis pli kuraĝe la ekscesulojn. La lastaj, vidante, ke kontraŭ ili oni kondukas la atakon, distranĉis per tranĉilo la murgazeton. Sed ĉi tiu daŭrigis sian aperadon regule dum la sabatoj. Numero kvara faris elpaŝon por interna ordo, por pureco, por eduka laboro.

La murgazeto proponis demeti "miraklofaran" ikonon, pendantan en la komuna kuirejo depost la tempo de regado de caro Nikolao. Rezulte kontraŭuloj de la murgazeto plimultiĝis je deko da preĝantoj-maljunulinoj.

Ĝia kvina numero, kun dek notetoj kaj desegnoj, starigis la demandojn tiel akre, ke oni elvokis ventegon da disputoj, eĉ batalojn ĝis la unua horo nokte. La ekscesuloj perdis la lastan simpation ĉe la loĝantaro, kaj ili komencis, sentante lastajn horojn de sia regado, furiozan atakon. Ilin organizis konata demagogo, drinkulo kaj insultulo Galenĉak. La aktivulojn de l' murgazeto oni submetis al sensenca persekuto. La virinoj ploris, timante pro la edzoj, labkor-oj[1]; la edzojn oni primokegis pro iliaj edzinoj-labkor-inoj.

Atakoj . . . kontraŭatakoj

La ekscesuloj ne nur atakis la aktivulojn, sed kuraĝis laŭlitere klaĉe malŝatigi la murgazeton. Galenĉak deŝiris la noteton, kiu parolis pri li. La redakcia kolegio kontraŭatakis la ekscesulojn, kaj sekvantan tagon komuna kunveno de l' loĝantaro de la domo mallaŭdis la ekscesulojn kaj postulis puni ilin.

Galenĉak organizis komunan fronton el ekscesuloj, drinkuloj kaj preĝantinoj, perdintaj la ikonon. Li kolektis 33 subskribojn sub provoka raporto, en kiu oni kulpigis la murgazeton kaj komunistojn pro rompo de "trankvila vivo".

Responde eliris numero sesa de l' murgazeto, en kiu oni senmaskigis la farojn de la ekscesuloj. Pli multe ol duono de la loĝantoj en la domo stariĝis p o r la murgazeto. La redakcia kolegio konsistis jam el 8 personoj, el kiuj 5 estas senpartiaj kaj 3 virinoj. La tuta loĝantaro prenis flankon de la murgazeto. La ekscesuloj perdis ĉian simpation. Galenĉak petis amnestion. La vivo en la etaĝo ŝanĝiĝis . . .

La transformiĝo de la moroj

Fariĝas nova morara revolucio. La etaĝon oni ne povas rekoni. Nun oni trovis la mastron, pri kiu pensis kredeme la maljunulinoj, kaj la mastron efektivan, konscian, kiu estas pli forta ol iu supre starigita. Ĝi estas la aktivularo, konscia parto de la gelaboristaro, kiun trovis, elektis kaj organizis la murgazeto.

Ĉe l' nova mastro estas nova vivo. La ekscesulojn oni ne vidas: oni malebligis ilin ekscesi. Se iu drinkas, tiam li silente eniras sian ĉambron, blekas, ĝemas, sed ne diboĉas. Eĉ "kantantaj birdoj", kiuj inter boteloj da alkoholo kantis pli frue ĝis la mateno, nun silentiĝis. La karnavalo pasis sen bruo kaj skandalo. Se ĝis nun oni postulis dum grandaj festoj la rapidan medicinan helpon kaj milicianon, tiam nun ne plu estas bezona eĉ la kortisto. La kvina etaĝo paŝis al nova vivo, pri kiu ĝi ne eĉ povis revi du monatojn antaŭe.

La murgazeto daŭris aperadi regule dum la sabatoj. Ĉe la tempo de loka konsiliĝo de labkor-oj oni eldonis n-on 8. La ĉefan atenton oni donis al mastruma servo kaj al eduka laboro. Ankaŭ ĝi ne forgesis la ŝparkasan kompanion, batalis ĝi plie kontraŭ panikuloj en provizumado.

Malfacila estis la vojo de l' unua etaĝa murgazeto, tamen ĝi estas jam trairita. Nun ĝi transportis sian provon en aliajn etaĝojn de l' domo. Estas jam organizita murgazeto en la dua etaĝo, oni preparas ĝian aperon en la tria . . . Oni devus enkonduki en aliaj domoj samon laŭ tiu ĉi modelo. Ne alia gazeto povas esti tiel proksima, tiel organize kun-

---

[1] La verkinto proponas la vorton "huligano" (el angla lingvo), kiu komencas internaciiĝi k evidente akceptiĝis ruslingven. Ni ne riskas decidi pri neceso k uzindeco de tiu vorto. — Red.

[1] Labkor-oj = laboristaj korespondantoj.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

18. Pri la historio de l' himno: "La Internacio"

En 1792, kiam la revolucia Francio estis minacita de la koalicio el despotoj, "perfiduloj, reĝoj-konspiruloj", Ruĵe de l' Il (france: Rouget de l' Isle) donis al ĝi ĝian nacian himnon La Marsejezon. Kaj la sorto de la strofoj de Ruĵe de l' Il estis tia, ke dum la paso de l' 19-a jarcento, en ĉiuj horoj de demokrata ekagitiĝo, ili estis eksonigataj spontane de la popoloj leviĝantaj. Malpermesite sub la Restarigo[1], La Marsejezo reviviĝas ĉe la suno de julio 1830. Malpermesite sub la monarkio de julio, ĝi reviviĝas en la eklumoj de februaro 1848. Malpermesite ankoraŭ la tagon post la 2-a de decembro, ĝi reekvivas neforgeseble je la 4-a de septembro 1870: kaj la infanoj, kiuj neniam aŭdis ĝin, scias ĝin tiel bone kiel la maljunaj. Sama sorto de La Marsejezo en eksterlando: oni kantas ĝin en Bruselo, placo de l'Monfarejo, la 25-an de aŭgusto 1830; oni kantas ĝin en Berlino la 18-an de marto 1848; oni kantas ĝin en Lisbono, la 4-an de oktobro 1910, kiam la portugala popolo forĵetas la monarkion de l' familio Orleana kaj proklamas la respublikon. Tiel, oni povas diri, Francio donis sian himnon de espero kaj de batalo al la eŭropa demokratio.

Per kurioza koincido, la laborista Francio, la franca socialismo, donas, pli malfrue, al la revolucia socialismo internacia sian himnon de depostuloj kaj de batalo: la Internacion.

Sed nur je la fino de l' 19-a jarcento — tiam, kiam depost 1840 proksimume, la socialismo en pli malpli rekta maniero miksiĝis kun la vivo de l' nacio — la francaj socialistoj akceptos la strofojn, kiuj vere estos iliaj kaj kiujn ili donos al la mondo.

En 1848, Petro Düpon' (fr.: Dupont) momenton estis la interpretisto de l' proletaj depostuloj, kun sia belega Kanto de l'Laboristoj, kiun admiris tiel forte Bodeler' (fr.: Baudelaire):

Ni, kies lampo en maten'
Ĉe l' krio de l' kok' relumiĝas,
Ni ĉiuj dungitoj en katen',
Laborante jam antaŭ tagiĝas,
Ni, kies brakoj, man' kaj pied',
La tuta korp' luktas sen ĉeso,
Sen pormorgaŭa vivrimed'
Kontraŭ la frosto de l' maljuneco,

Nin amu; se eblas, distingu
Kuniĝe por trinki en rondo,
Ĉu silentu kanono aŭ tondru,
Ni trinku
Pro l' sendependeco de l' mondo.

[1] Reakcia, monarkia periodo en Francio (1814—1830). — Trad.

La idealistaj laboristoj de Düpon' adoras la naturon, prikantas la grandajn arbarojn kaj iliajn favorajn ombrojn:

Dume sanĝ' nia ruĝa bolante
Fluas flamege tra vejnoj niaj,
Ni plezuriĝus sunumante
Kaj en kuŝiĝ' sub kverk-folioj.

Sed pli ankoraŭ ol la Kanton de l' Laboristoj, la socialistoj el 1848, tute sub la influo de la tradicioj el la Franca Revolucio, eksonigas la rekantaĵojn de 1792 kaj 93, kaj la kunsidoj de iliaj kluboj, de l' klubo Blanki (france: Blanqui) kiel de l' kluboj Raspaj (france: Raspail) kaj Barbès, estas preskaŭ ĉiam finataj per la strofoj de La Marsejezo kaj la Kanto de l'Ekiro.

Sekvantan tagon post la Komuno, kiam la Franca Laborista Partio kaj la diversaj socialistaj grupiĝoj organiziĝas, iliaj anoj ekkantas, dum siaj manifestacioj kaj siaj familiaj festoj, ĉu la Karmanjolon de 1793, al kiu estas aldonita strofo rilata al la pariza ribelo de 1871[1], ĉu diversajn kantojn hodiaŭ iom forgesitajn. Estas menciinda La Mariano, de l' iama komunano Suätr' (fr.: Souêtre), kiu, de 1883 ĝis 1889, konis veran furoron:

Nom' mia estas Mariano
Nom' fama tra l' tut-univers',
Kun gest' mi brava kaj profana
Ruĝĉapon portas en transvers'.

De Aĥilo Lerŭa (fr.: Le Roy) estas La Kanto de l' Proletoj:

Antaŭen, Proletaro!
Batalu por la Egalec'!
Tiran' kaj sekvantaro,
Vi cedu al la Liberec'!

La blankistoj akceptas kun prefero en siaj grupoj kanton, kiu rememorigas samtempe pri jaro 93 kaj la Komuno kaj kies tiujn du strofojn ni citas:

Simplul', ĉu ci ne kredas?
Venis temp', ke ci ekvekiĝu,
Lon Ler'[2]
Simplul', ne kredas ci,
Venis temp', ke ci ekvekiĝu,
Lon la[1]!

Dormem' longtempa jam finiĝu:
Estas liber' en ĝem' kaj plor'.
Simplul', Simplul',
Leviĝu, jen l' aŭror'!
Vivu Komun', lon ler'!
Vivu Komun', lon la!

Simplul', ĉu ci ne aŭdas
Moki burĝon cian mizeron?
Lon la!
Li diras pri sang-degenero,
Cia ras', iam tiom fiera
Fleksiĝas ĝi nun en angor'.
Simplul', simplul',
Kia iĝis cia kor'?
Vivu Komun', lon ler'!
Vivu Komun', lon la!

[1] Jen tiu ĉi strofo:

Vivu Komuno de Pariz',
Mitraloj ĝiaj kaj haŭbiz'!
La Komun' post milit'
Nomas sin nevenkit'.
Ĝi havos sian venĝon:
Vivu la son',
Vivu la son' de l' kanon'!

[2] Netradukebla interjekciaĵo. — Trad.

Iom post iom tiuj ĉi diversaj strofoj, kiuj respondas al la diversaj tendencoj kaj diversaj momentoj de l' socialista evoluo, faros lokon al La Internacio.

Kiuj estas ties aŭtoroj? Ili nomiĝas Eŭgeno Potje (france: Pottier), por la paroloj; Degeter (fr.: Degeyter), por la muziko.

Aleksandro Zévaes. Trad. N. B.
(Daŭrigota.)

---

ligita kun la moraro de gelaboristoj kaj iliaj familioj, kiel la doma murgazeto. Tiu ĉi afero efektivigas la decidon de l' IV-a tutsindikata konsiliĝo de labkor-oj pri amasa alkonduko de pretaj laboristaj tavoloj al kreada laboro por-socialisma pere de l' gazetaro.

Laŭ artik. de K-do Kun esp-igis
V. Kurmanojev.

DISKUTEJO

"Kial nudkulturo?"

Mi miras pri la opinioj eldiritaj de kelkaj K-doj en "S-ulo". Strange ŝajnas al mi, ke ili ne simple propagandas proprajn ideojn, sed miksas ilin kun devoj de SAT-anoj. Ili konsideras SAT kvazaŭ "sakon plenan da ĉio..." Kaj alligante al SAT diversan idearon oni perdas, forkolorigas la ĉefaĵon: "Prolet-eco! Sennacieco!"

SAT estas unuecfronta organizo, ĝi helpas al diversaj proletaj organizoj kaj toleras diversajn partiajn proletajn tendencojn. Tamen tio ne signifas, ke SAT ne havas kriterion. Ĝi devas esti kaj estas: "Sennacieco!"

Konkrete: mi volas unue kontraŭdiri al K-dino 2055 pro ŝia "Kial nudkulturo?", kie ŝi atestas: "Ni SAT-anoj el la tuta mondo almenaŭ estu sinceraj, ankaŭ tiurilate estu batalantoj kaj rompu kun la tradicio..." Alivorte ŝi alvokas al komuna banado de la Ge-SAT-anoj! Al mi ŝajnas, ke tiun ŝarĝon SAT sur sin ne devas preni. Agu do speciala sportasocio, en kiu partoprenu interesitaj SAT-anoj. Aliel povos okazi jeno:

A: Kiuj estas SAT-anoj?

B: Nu, tiuj, kiuj komune, viroj kaj virinoj, sin banas...!

Certe "nudpropagando" ne devas esti kunligata kun devo de SAT-ano. Vere, SAT estas "la plej maldekstra" organizo en la mondo rilate al gentaj kaj religiaj antaŭjuĝoj. Ĝiaj anoj, "la satanoj" (diabloj), forlasis, se ne materie, almenaŭ mense, la karan kaj netuŝindan en burĝa socio nomon: Patrio! Anstataŭ patrolingvo ili preferas uzi internacian lingvon, aplikante ĝin en mondskalo por helpo al Proletaro. Tio estu ĉiam nia kriterio. Mi ne kontraŭas, ke SAT-anoj propagandu nudkulturon, sed ili ne ligu tion kun SAT-ana devo: aliel okazos konfuza miskompreno, ĉar vere estas ankoraŭ tro kritika konsidero al nudproblemo flanke de nuna socio kaj eĉ de SAT-anoj.

Vik Zimin (6184), Taŝkent[1].

[1] Kion la K-do diras krome pri la seksa temo, ni ne enpresigas, ĉar ni fermis la diskuton pri tiu temo kun la publikaĵo en n-oj 253/254. — Red.

Korektoj. En n-o 255, pĝ. frunta, 3-a kol., 9-a lin. de supre, legu "tion" (anst. tiom). Sur pĝ. 474 la titolo komprenėble devas teksti: "Tre notinde!" Pĝ. 478, 3-a kol., lin. 28 de supre legu "ombro" (anst. nombro), lin. 33 "ĉu" (anst. ĉiu).

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

Kion celas la instruistinoj en la mondo?

De franca instruistino, SAT-anino, ni ricevis jenan, tre interesan kaj objektivan artikolon:

Akiri la saman rajtaron, kiun ĝuas iliaj instruistaj K-doj! Saman salajron, saman spiritkulturon! Longdaŭran, pagatan pronaskan libertempon! Plenan liberecon rilate sian privatan vivon! Sian rajton partopreni socian kaj politikan vivon! — La instruistinoj, vere konsciaj pri sia sociklaso kaj celantaj akiri sian emancipiĝon, nepre aliĝu al: Internacio de la Gelaboristaro de l'Instruado, kies ĝenerala sekretario estas: K-do Vernochet, 8, avenue Mathurin-Moreau, Paris 19-e.

Alvoko de la feminismaj grupoj de la Internacio de la Gelaboristaro de l' Instruado al la tutmondaj instruistinoj

Karaj K-dinoj! Preskaŭ ĉie la instruistoj elportas doloriĝan ŝtatan perforton: sed por la instruistinoj ĉi tiu ŝtata perforto estas pli akre sentebla. En preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo la edukistino elportas sian virinan sklaviĝon. Kiam ŝia profesia klereco ne estas mallongigita kaj ŝia salajro malaltigita, tiam la leĝo (ofte), la tradicio (ĉiam) deprenas de ŝi la plej ĉefajn rajtojn al la privata, familia kaj socia vivoj.

En Anglio, Svisio, Svedio, Finnlando ktp...., en dek eŭropaj landoj, la salajro de la instruistino estas malpli alta ol tiu de ŝia instruista K-do. En kelkaj landoj (Svedio, Holando, Finnlando ktp.) la instruistinoj komisiitaj por la tiel delikata edukado de la plej juna infanetaro en la "malgrandaj lernejklasoj" estas konsiderataj kiel "malsuperaj" edukistinoj: tial ilia pedagogia sciado estu negrava kaj ilia salajro nur duona!...

Estas landoj (Germanio, Anglio, Svisio, Holando ktp.), kie al la instruistino estas malpermesite edziniĝi: ŝi ne rajtas fondi hejmon! Se ŝi edziniĝas, ŝi estas devigata eksiĝi el sia ofico.

En kelkaj landoj (Rumanio, Svedio, Italio, Finnlando, Luksemburgo) la edziniĝinta instruistino ne rajtas ricevi pronaskan libertempon plen pagatan. En la momento, kiam pligraviĝas ŝiaj bezonoj kaj zorgoj, la instruistino estas devigata pagi, el propra mono, sian anstataŭantinon!

Ĉie — escepte eble en la Sovetaj Respublikoj — la moralo politik-religia de la burĝaro trudas al la privata vivo de la edukistino siajn stultigajn antaŭjuĝojn. En ĉiuj kapitalistaj landoj oni plie povas konstati oficialan emon al la virinigo de la edukista profesio. Pri tio ni ne estas trompataj. Ni ja scias, ke la regantoj preferas labor-virinaron nur tial, ĉar ili opinias, ke jam senigita je siaj sociaj kaj politikaj rajtoj, la virino ne kuraĝos postuli pri siaj profesiaj rajtoj.

Esperu nenion atingi ĉe la registaroj pli malpli demokrataj — eĉ en landoj, kie virinoj rajtas baloti kaj esti elektataj. La emancipiĝo de la instruistinoj realiĝos nur el agado de la instruistinoj mem, helpe de la cetera gelaboristaro, gefrataj samklasanoj.

La instruistino staru unuavice ĉe la feminisma movado, same, kiel ŝi estu en la mezo de la tutlaboristara movado!

* * *

Al vi, K-dinoj instruistinoj, jam aliĝintaj al sindikatoj, koleginoj en landoj, kie aparta situacio vin devigis fondi specialajn asociojn de instruistinoj (Anglio, Svedio), al vi ankaŭ, izolaj koleginoj aŭ aninoj de gravaj "neŭtralaj" asocioj, la feminismaj grupoj de la Franca Federacio de la Laika Instruado



Sovetia afiŝo: "La nova virino"

direktas sian tutfratan saluton kaj konsilas vin senprokraste aliĝi al la sola internacia proletara organizo celanta la profesidefendon de la tuta tutmonda geinstruistaro: La Internacio de la Gelaboristaro de l' Instruado. Kaj ni insiste vin petas respondi al ni por daŭrigi la rilatojn kaj por realigi la internacian kunligon inter la du milionoj da edukistinoj en la mondo.

* * *

En Francio, laŭ pedagogia vidpunkto, ni estas sampreparitaj kiel niaj instruistaj kolegoj, kaj tiuj, kiuj sin dediĉas al la infanetara edukado, ricevas egalan salajron.

Post pli ol dekjara batalo ni sukcesis akiri la salajregalecon, al kiu kontraŭstaris la regantoj kaj grava parto el la instruistoj mem! Sed el ĉiuj ŝtatoficistoj ni estas la solaj ĝuantoj de tiu salajregaleco. Certe ni rajtas edziniĝi, kaj ni ne povas imagi pri tio, ke en kelkaj landoj tiu rajto ne ekzistas. Je ĉiu nasko ni ĝuas pagatan libertempon je du monatoj (1 monaton antaŭ kaj 1 monaton post la akuŝo). Ni opinias tion nesufiĉa.

En Francio la virino ne rajtas baloti. Ni tamen partoprenas la socian batalon. Okazis, ke kelkaj el niaj K-dinoj estis juĝpersekutataj kaj kondamnataj je gravaj monpunoj aŭ je malliberejo pro sia agemo pacifista, politika, sindikata kaj socia. Ni helpas niajn K-dinojn laboristinojn, por ke oni apliku al la virino la principon: "Por egala laboro oni pagu egalan salajron." Ni batalas por tutlibera patrineco, por tio, "ke la patrineco estu konsiderata kiel socia funkcio". Ni batalas por malaperigo de la loĝejaĉoj, celante plibonigon de la infanara stato. Ni precipe batalas kontraŭ la militon kaj nia propagando estas trafa.

Kaj vi, K-dinoj? — Kia estas via situacio? Kial estas limigataj viaj rajtoj? Kia estas via agado? Skribu al ni. Respondu jenan demandaron:

1. Ĉu en via lando la instruistinoj estas devigataj partopreni samajn kursojn kaj ricevi samajn kulturatestojn kiel la instruistoj? Ĉu en la pedagogiaj (geinstruistaj) lernejoj la gelernantoj estas kuninstruataj kune? Ĉu la instruistoj sin dediĉantaj al infanetaraj lernejoj partoprenas specialan ekzamenon?

2. Ĉu la salajroj, la monhelpoj, la pensioj de la instruistino estas egalaj kun tiuj por instruisto? Kia estas via agado por atingi salajregalecon? Ĉu la instruistinoj estas helpataj de la instruistoj? Ĉu la instruistinoj estas grupigitaj en specialaj organizoj? Kiaj? —

3. Ĉu la instruistino rajtas edziniĝi daŭrigante sian edukan oficon? Ĉu ĉiam estis tiel? Ĉu la instruistinoj estas pli multnombraj ol la instruistoj? Laŭ kia proporcio? Kiaj estas la kaŭzoj? —

4. En kiaj cirkonstancoj la vidvino de instruisto oficanta aŭ pensiita rajtas ricevi pension? Ĉu la vidvo de mortinta instruistino, pensiita aŭ ne, rajtas ricevi pension? Ĉu la fraŭlaj instruistoj kaj instruistinoj pagas al speciala kaso por vidvinoj kaj orfoj? Ĉu la edziniĝintaj instruistinoj pagas al ĉi tiu kaso tiom, kiom pagas la edziĝintaj instruistoj — eĉ se tiu kaso ne pensiumas la vidvojn?

5. Ĉu la instruistino rajtas havi pronaskan libertempon? Kiom daŭra? Ĉu ŝi estas devigata pagi sian anstataŭantinon el propra mono? Ĉu oni toleras, ke instruistino estu patrino ekster la edziniĝo aŭ ke ŝi kunvivadu kun la amiko, kiun ŝi elektis?

6. Ĉu en via lando la instruistinoj rajtas baloti? Ĉu ili partoprenas la feminisman kaj profesian movadojn? Ĉu en la instruada fako ekzistas feminismaj grupoj?

7. Kiaj estas viaj postuloj laŭ profesia, socia kaj politika vidpunktoj? Kiaj estas viaj plej efikaj batalrimedoj?

Sendu la respondojn al: K-do Boubou (sekretario de la pedagogia esp. servo), 96, rue St. Marceau, Orléans (Loiret), Francio.

La Centra Komitato de la feminismaj grupoj de Franca Federacio de Laika Instruado.

En katenoj de la maljusteco

Virina Krestomatieto

40 paĝoj. Prezo: 0,60 mk. g.

Mendu ĉe **Administrejo de SAT,** Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

TRA ESPERANTIO

POSTKONGRESA TRANKVILO

Apenaŭ la 9-a SAT-Kongreso finiĝis, k jam ree en Leipzig estas ĉio "trankvila". Nur ankoraŭ kelkaj K-doj troviĝas ĉi tie[1], iuj eĉ deziras resti, sed la aliaj en sekvantaj tagoj ankaŭ forlasos la urbon. Permesu, ke en nuna "trankvilo" mi esprimu iome impresojn pri la kongreso.

Multaj Gek-doj, pli multaj, ol la Kongresa Komitato imagis al si, kvazaŭ surprize atakis la urbon Leipzig per sia vizito. Ne mirinde estas pro tio, ke la Gek-doj en la akceptejo preskaŭ ne kapablis, laŭ gusto de ĉiuj kongresintoj k plej rapide plenumi sian malfacilan taskon. Tamen mi deziras k esperas, ke finfine ĉiuj Gek-doj kongresintaj komprenu tiun malfacilan taskon de la akceptintoj k pardonis jam eblajn malagrablojn.

Generale certe la Gek-doj, kongresintaj por komuna laboro, laŭcirkonstance povas esti kontentaj. Speciala laboremo evidentiĝis dum la laboraj k fakaj kunsidoj, kiuj — escepte nur malmultaj okazoj — entute estis tre bone vizititaj. La diskutoj ofte estis iom tre, aŭ ni diru, t r o pasiaj, kio tamen ne povis malhelpi, ke finfine la Gek-doj unuanime akceptis la gvidan rezolucion por estonta komuna laboro.

En multaj fakkunsidoj la Gek-doj speciale traktis la utiligadon de esp-o al ia speciala laborista movado. Sed mi avertu: la partoprenintoj ne imagu al si, ke nun tuj montriĝos gravaj rezultoj en koncernaj organizoj pro tiuj fakkunsidoj. Nia antaŭenmarŝo en ĉiuj laboristaj rondoj finfine nur dependas de nia individua k kolektiva laboro en tiuj organizoj. La fakaj kunsidoj nur pridiskutis la eblajn vojojn, preparis komunan "atakadon", sed la efektiviĝo de la planoj difinitaj en la fakkunsidoj neniel progresos, se vi, la pioniroj de la laborista esperanta movado, ne faros vian devon.

"Amuzaj" aranĝoj dum la kongreso ne estis multnombraj. Kelkajn horojn la Kongresa Komitato difinis por tiu celo, sed eble al iuj kongresintoj tiu tempo ne sufiĉis. Ni sincere konfesu, ke la kongreso unuavice estis aranĝita, por okazigi la laborajn k fakajn kunsidojn. "Amuzaj" aranĝoj nur enteniĝis en la programo por ebligi al la laborantoj dumkongresaj iometan distriĝon. Neniu plendo pri manko de tiaj aranĝoj ĝis nun venis: Ĉu do ĉiuj Gek-doj plene konsentis al tio?

Dum la burĝaj gazetoj tute ignoris la kongreson de la proletaj esp-istoj, la laborista gazetaro de Leipzig des pli atentis nian 9-an SAT-Kongreson. Ĉiutage aperis longaj raportoj pri niaj aranĝoj, kiuj laŭ speciala tendenco de la gazetoj respegulis la ofte tro pasian diskutadon dumkongresan. En la komunista gazeto krome ĉiutage aperis speciala rubriko en esp-o kun novaj sciigoj "El tuta mondo". Kiel nun montriĝas, ne nur la gazetoj de Leipzig, sed multaj laboristaj gazetoj alilokaj ankaŭ jam, raportis pri nia kongreso.

La Proletaro neesp-ista tre interesiĝis, la kongreso ne estis nur aranĝo de la esp-istoj, sed la tuta organizita laboristaro tre simpatie partoprenis niajn aranĝojn. Tio pruvas, ke ni ne estas ia sekto, ke ni estas jam forte ligitaj kun la tuta klaskonscia laboristaro. Kaj tiun vojon ni surpaŝu ankoraŭ pli atenteme, ĉar nur tiam ni plej sukcese kapablos utiligi esp-on por la ĝenerala ĉiufaka laborista movado tutmonda.

La kongreso finiĝis; ne ĉio funkciis tute glate, laŭdezire. Tamen ni esperu, ke la 9-a SAT-Kongreso signifu ne malatentindan paŝon antaŭen al nia celo: Esperanto fariĝu la dua lingvo de ĉ i u Proleto en tuta mondo, esp-o estu en la praktiko unu el la plej valoraj rimedoj en la revolucia klasbatalo, por la finvenko de la Proletaro, por la Socialismo!

Laboru, luktu, batalu ni ankaŭ en estonto komune! Neniam ni laciĝu k bone ni atentu, ke nia organizo restu vere klasbatala, proleta organizo unueca!

715 — L e i p z i g.

[1] Je la 11. aŭg. — Red.

SOVETIANOJ KAJ 9-a SAT-KONGRESO

Speciale por kontentigi la diversajn demandojn de sovetiaj Gek-doj, ni ĉi sube simple konigas la ricevitan dokumenton. Pli detala klarigo de la tuta afero certe ne necesas, ĉar tiu "kultura dokumento" ĉion mem rakontas.

Responde al petskriboj, permesi ankaŭ al la sovetiaj Gek-doj, petintaj vizon por eniri Germanion, la partoprenon ĉe la 9-a SAT-Kongreso, la germana registaro, pli precize ĝia "Oficejo por eksteraj aferoj", sendis jenan "kulturdokumenton":

"Berlin, la 30-an de julio 1929. Mi honoras, plej sindoneme kvitanci la ricevon de viaj komplezemaj skribaĵoj de 20. k 26. de julio k. j. k samtempe sciigas al vi, ke la Oficejo por Eksteraj Aferoj rajtigis la germanan ambasadoron en Moskvo, doni la enirpermeson por Germanio al s-roj Drezen k Demidjuk. — La Oficejo por Eksteraj Aferoj estis konsentema al tiu favoro, post kiam flanke de la reprezentanto de via asocio en Berlin tutklare estas deklarita, ke la mondasocio akceptos la nomitajn s-rojn nur kiel siajn membrojn, sed ne kiel reprezentantojn de iaj komunistaj esperanto aŭ aliaj organizoj k plue, post kiam la mondasocio sin ligis, zorgi pri tio, ke la s-roj el Moskvo detenos sin de ĉia politika agado en Germanio. — Komisiite: Heucke." (715.)

La poŝto dum nia 9-a Kongreso

La Leipziga poŝtadministracio estis konsentinta instali poŝtoficejon en nia kongresejo. Subskribinta K-do, kiu estas mem poŝtoficisto, el la grupo Leipzig, deklaris sin preta transpreni la poŝtan servon dum sia regula libertempo. Per tio la Kongreso ŝparis la kostojn por la oficisto.

Oficiale devis esti malfermita la oficejo de la 4-a ĝis 8-a de aŭg. en la horoj 8-a—12-a k 14-a—18-a. Sed vere tute ne sufiĉis tiu tempo por la necesaj laboroj. Nia K-do nur povis fermi sian oficejon dimanĉon je 22.30 h., lundon je 20.30, mardon je 19-a, merkredon je 18.30 h. Nur ĵaŭde li fermis jam je la 15.30 h., ĉar li devis ankoraŭ samtempe redoni la kongres-stampilon k la aliajn poŝtajn objektojn. Eĉ dum la tagmezaj paŭzoj li ofte devis kontentigi klientojn. De lundo ĝis merkredo helpis libervole ankoraŭ dua poŝtisto, ankaŭ Leipziga grupano.



La poŝta stampo de l' Kongreso.

Jen la ciferoj pri la faritaj laboroj en la kongresa poŝtoficejo:

Ekspeditaj poŝtaĵoj (kartoj, leteroj k presaĵoj):

je dimanĉo (nur posttagmeze)	573	pecoj
„ lundo	1114	„
„ mardo	1040	„
„ merkredo	614	„
„ ĵaŭdo	1089	„
Sume:	4430	pecoj.

Venditaj poŝtmarkoj: 5040 pecoj. Ties valoro reprezentas la sumon de 467 mk. g. R. S c h i n k e l.

El la Administrejo!

Atentu! **Atentu!**

Restis ankoraŭ kelkaj aĵoj de la 9-a Kongreso, kiujn transdonis la Kongres-Komitato al la Administrejo de SAT por vendi. Ni petas la Gekdojn t u j m e n d i i l i n, ĉar la provizo ne estas granda.

Kongres-Programo . . .	0,25 mk.g.
Kongres-Insigno	0,30 „
3 div. foto-poŝtkartoj de la Kongreso, 12 pecoj . . .	1,— „
Diversaj ilustritaj poŝtkartoj, 10 pecoj	0,50 „
Kongres-foto, 24 × 18 cm .	1,50 „

Inkluzive afranko

NIAN SAT-MOVADON DEVAS KONSISTIGI PURE LABORISTAJ ELEMENTOJ

La sekvantaj konsideroj estas eltiritaj el letero de gvidanto de labkor-a rondo en Moskvo al eksterlanda labkor-o:

"Nia rondo pligrandiĝas. Ĉar niaj Gek-doj neniam ankoraŭ interkorespondis kun alilandaj gelaboristoj, ĉar neniu el ili posedis alian lingvon, la interkorespondada komenco donis al ili tre multe da novaj interesaĵoj. Iliaj unuaj respondoj aspektas preskaŭ same. Ĉar antaŭ ol respondi ili rigardas, kion skribas la plej sperta el ili. Sed nun, sendante leteron post letero, ili ekhavos korespondan sperton kaj memstarecon. Ili nun komencas pli serioze pripensi diversajn detalojn el sia vivo, kiujn ili tute malatentis ĝis nun. Jam nun mi rimarkas, ke la interkorespondado edukas en ili k l e r a n klaskonscion... Vi imagu, kvankam ni en Sovetio ĉiam diras, ke ni estas 'revoluciemaj esp-istoj', kvankam ni ĉiam fieras, ke ni uzas esp-on por niaj klasaj bezonoj, sed ni konstatas, ke ofte ni propagandas esp-on neŭtralul-metode, kaj rezulte ni ĉerpas novan nian anaron ne inter gelaboristaro, sed inter intelektularo. Ni devas laboristigi nian movadon, kaj nur tiam ĝi estos ideologie pura. Sed por tiu celo ni devas tute ŝanĝi niajn propagand-metodojn.

"Jen mi provas ilin ŝanĝi. Mi ne propagandas esp-on. Mi nur tradukas la ricevatajn leterojn esperantlingve skribitajn. Mi nur tradukas esp-on la sendatajn respondleterojn. Kiam ni komencis nian laboron, neniu el la partoprenantoj tuŝis la lingvan problemon, neniu interesiĝis pri ĝi... Nun la gekorespondantoj p o s t u l a s, ke ni organizu studrondeton. Mi respondas, ke ili ne serioze intencas tion, ke estas somero kaj ili lernos neregule. Mi elektos el la dezirantaj nur kelkajn plej diligentajn, plej lertajn. Mi instruos nur tiujn kapablulojn, kiuj estas aŭtoritataj en siaj laborejoj kaj fabrikoj. Jam post kelkaj lecionoj ili mem tradukos, ŝvitante, helpate de l' vortaro, ricevitajn leterojn. Tio efikos la amason. Tio pruvos, ke esp-o estas lingvo tre facila, kaj se iu diros, ke la lingvo por li estas malfacila, oni respondos, ke oni devas s t u d i, sed ne studaĉi.

"Alia grava momento estas pliviglig0 de l' esp. movado en alilando: ni respondis al nacilingve ricevitaj leteroj esp-e kaj atendas kun granda intereso respondojn de tiuj unuaj K-doj, kiuj nun jam verŝajne kuradas de loko al loko serĉante tradukiston. Kion ili respondos al ni? Ja unu tia respondletero estas sendita al laboristo en Pariza aŭtomobilfabriko "Sitroen", aktiva labkor-o. Dank' al tia propagand-metodo ni kreos por esp. movado ankaŭ pli influhavan anaron. Ni devas ege zorgi pri ideologia pureco de n i a movado. Ankaŭ niaj propagand-metodoj tial devas esti revoluciemaj. Ni neniam devas forgesi, ke revoluciema esp. propagandisto estas ne tiu, kiu neŭtraluleme babilaĉas pri perfekteco de esp-o, sed kiu jam nun a p l i k a d a s esp-on por bezonoj de sia klaso. Tiun testamenton ni n e n i a m devas forgesi...

H. P o n j a t o v s k i (Moskvo)."

ESPERANTO ĈE LA PARTIOJ

En Varsovio okazis 20. k 21. julio landkongreso de l' Pola Partio Socialista Maldekstra, kiun partoprenis 192 delegitoj k 676 gastoj. La kongresanoj tre favore rilatis al esp-o. Kiam aperis sur la tribuno la salutinto je la nomo de l' varsoviaj k lodzaj prol. espistoj, K-do 10 750, li estis akceptata per laŭtaj aplaŭdoj. Aŭdiĝis ankaŭ post liaj paroloj elvokoj: "Vivu esp-o!"

La kongreso mem estis grandioza manifestacio kontraŭ la faŝisma diktatoreco en Polio, kontraŭ persekutoj k amasaj arestoj de aktivaj anoj de leĝa partio. Inter aliaj rezolucioj estis akceptata ankaŭ la jena:

"Konsiderante la gravan signifon, kiun havas esp-o kiel komprenilo por la internacia revoluciema proletaro en la batalo kontraŭ la kapitalista fiordo, la landkongreso de PPS Maldekstra, okazinta la 20.—21. julio en Varsovio, rekomendas al siaj membroj 1. lerni k propagandi la facilan lingvon intern. esp-o; 2. per tiu lingvo korespondadi kun eksterl. revoluciemaj K-doj por havigi materialojn por partiaj, profunuiĝaj k fabrikaj gazetoj; 3. batali por enkonduki esp-on en la popolaj lernejoj k 4. subteni la proletan intern. esp. movadon. La partia gazetaro devas helpi efektivigi la akceptitan rezolucion."

La rezolucio estis akceptita sen voĉdonado, sed per senfinaj aplaŭdoj.

Ĉ e e s t i n t o.

Rim. Oni aldonu al la artikolo pri "P. P. S. Maldekstra", kiu aperis en n-oj 253/54, jenan korekton: La eks-ĝeneralsekretario Andĵej Ĉuma estas jam liberigita, sed vendis sian animon al la "defenzivo" (politika polico). Pro liaj denuncoj dekoj da plej agemaj K-doj troviĝas jam malantaŭ la kradoj.

(10 750.)

ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO

Ni jam diris antaŭ nelonge, ke rilate al la diversaj ekzistantaj stenografiaj sistemoj ni devas havi en nuna momento neŭtralan sintenon. Ĝis eble iun tagon per helpo de kompetentuloj la SAT-anaro decidiĝos akcepti por si unu difinitan sistemon. Tial ni ankaŭ konigas la sekvantajn liniojn. *Red.*

En n-o 243 mi legis bonan artikolon de K-do Spet pri tiu temo. Mi nun volas iom kompletigi la sciigojn de la aŭtoro. Ekzemple en Germanio ekzistas la "Germana Laborista Stenografa Unuiĝo". Ĝia celo estas enkonduko de la moderna mallongskribo (stenografio) en la popol-lernejoj. Ĝi anstataŭu estonte la nunan ordinaran skribon. La stenografio estu la vera popolskribo. Kompreneble la nova skribo posedu ĉiujn avantaĝojn de la malnova skribo. Sed ĝi havu krome la grandan avantaĝon esti pli mallonga, pli skribebla, pli facile legebla ol la nuna skribo. La nomita Unuiĝo, kiu jam agadas en diversaj landoj, eldonis i l u s t r i t a n s t e n o g r a f i - e l e m e n t l i b r o n kaj akiris en Madrid la plej valoran premion dum la granda Intern. Sten. Kongreso. Nuntempe estas prilaborata lernlibro "Esperanto-Stenografio Arends" (Eldonejo: Deutscher Arbeiter-Stenographen-Bund, G. Richter, Lahr i. B., Germ.). Ankaŭ tiu ĉi esp. eldono helpos pruvi, ke la nova mallonga skribo povos esti la sola unika skribo, kiun estonte lernos ne nur niaj idoj (en elementaj lernejoj), sed ankaŭ la esp-istoj, ĉefe laboristaj. La stenografio estu ilo por ĉ i u j homoj, ne sole ilo por riĉuloj kaj oficistoj! Skribo kaj lingvo laboru kune por socialismo!

(1851)

ĈU NUR KUN URBANOJ?

Laŭ korespondpeto en "S-ulo" mi ricevis el Sovetio abundan kvanton da proponoj. Pro tio mi multajn fordonis al K-doj loĝantaj en vilaĝoj. Ili skribis al la adresoj, sed — vane atendis respondon.

Ĉar preskaŭ ĉiuj en vilaĝoj spertis tion, mi rajtas supozi, ke oni ne ŝatas korespondi kun kamparanoj, sed nur kun urbanoj. Tio estas nejusta. Ĝuste la vilaĝanoj sopire atendas sciigojn el la

Ĵus aperis la riĉenhava aŭgusta kajero de



LA NOVA EPOKO

Literatura serio — **Unuopa n-o 0.35 mk. g.**

ENHAVO: LEON PAEGLE: Ŝarado n-o 7. Kvar scenoj. El la latva trad. A. K. — ROMANO FRENKEL: (laŭ D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ): Al laboristino. Vers. — G. GERŜUNI: Fabelo pri kaprino. El la rusa trad. V. Ŝeremetevskij. — N. S. PARGAĈEVSKIJ: Niaj revoj. Vers. (Orig.). — A. S. GRIN: Ora lageto. El la rusa trad. Nelmens. — N. V. NEKRASOV: Artistoj de verso. Kritika skizo pri N. Hohlov kaj E. Mihalski. — ERNESTO DREZEN: Historio de la Mondolingvo. (Tri jarcentoj da serĉado.) El la rusa lingvo tradukis N. Hohlov. (9-a daŭrigo.)

ADMINISTRACIO DE SAT, COLMSTR. 1, LEIPZIG O 27

ekstera mondo; por ili eksterlandaj korespondaĵoj estas granda okazaĵo, por urbano kutimaĵo. Kamparanoj scias ŝati kaj inde uzi poŝtaĵojn el fremdaj landoj, pri tio la skribintoj povas esti certaj. Sed pro la malĝojigaj spertoj miaj K-doj vilaĝanoj rifuzas akcepti korespond-proponojn, ĉar ili opinias senutile skribi... G. Nicŝe, Chemnitz.

Deklaro

Pri la agado de K-do S o a r e s en Svedio disvastiĝis inter la SAT-anaro diversaj famoj, pri kiuj nun enketas la Kontrol-Komitato. Dume pro insisto de K-do Soares k de la subskribintoj ni publikigas jenan ateston. — R e d.

Ni subsignintoj raportas, ke K-do S o a r e s (SAT-ano 6727) el Portugalio gvidis perfektigajn kursojn k paroladis ĉe diversaj organizoj pri la utilo de esp-o k lab. movado kun trafa sukceso tra Svedio. Krome, ni aldonas, ke lia SAT-propagando estis modela k ke lia konduto ĉe ni ne meritas riproĉojn. La en- aŭ eksterlandaj Gek-doj, kiuj estas malbone informataj pri K-do Soares, rajtas postuli S A T - a n a n ĝustigon. Lia honesta konscio estas preta por senvualigi ĉiujn eventualajn hipokritojn. En la enhavo de liaj paroladoj k artikoloj oni ankaŭ povas juĝi lin kiel konscian klas-batalanton k imiti lian ekzemplon. Se kelkaj Gek-doj pretendas pravigi siajn dirojn kontraŭ K-do Soares, ke ili ne sin kaŝu, sed postulu aŭdiencon! Ni estas pretaj por verdikti la kulpulon. En niaj vicoj devas regi n u r klasbatala justeco k ne hipokritoj kiel ĉe la kapitalista abomena mondo.

F r i t z B j ö r k l u n d (10 647), senpartia, N. T o b i a s s o n (11 846), socialista, A x e l O. G u s t a v s s o n (nova SAT-ano), komunista, A. F i l i p L a r s s o n (12 286), socialista, E s t e r A n d e r s s o n (nova), komunista, D o l l y G u s t a v s s o n (15 030), kom. L i s a J o h n s s o n (nova), senpartia, E v e r t L a r s s o n (12 011), senpartia[1], C. H o l m b e r g (7839), kom. A l f H e d l u n d (nova), senpartia, G u s t. R a s k (nova), kom. — G ö t e b o r g, 27. julio 1929.

I v a C a r l b e r g (nova membro), kom., J o h n R a s k (12 949), senpartia, C a r l L i n u s s o n (8060), kom., A d o l f N i l s s o n (nova), kom., G u s t. E n g g r e n (nova), kom., G u s t. A r v i d s s o n (nova), kom. — B o r a s, 7. aŭg. 1929. — Krome ni posedas alian similan deklaron, en kiu atestas[2]: T u r e V i r e n (12 927), komunista, A x e l N i l s s o n (9965) kom., A n d e r s P e t t e r s s o n (4694), kom., E r i c S o n a n d e r (nemembro esp.), kom., E l m a A d a m s s o n (9966), kom. — G ö t e b o r g, 31. 5. 1929.

[1] Tiu K-do estas aktiva komunisto, sed pro prudento subsignis: senpartia.

[2] La originalo troviĝas en la manoj de K-do S o a r e s.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Francio. Grenoble. La grupo sukcesis interesi la solan regionan kompartian gaz. "Le Travailleur Alpin" pri esp-o. Depost proks. 3 monatoj ĝi regule aperigas esp. kronikon. Propagando aktiviĝis per vizito al sindikataj k publikaj kunvenoj k vendo de lernolibretoj. 18. julio K-do Coll parolis ĉe la avangarda instruista sindikato pri esp-o. Oni aprobis aperigon de regula kroniko en la monata bulteno de l' sind. Ankaŭ dum la nacia k kolonia liberpensula kongreso (kiu okazos ĉi tie en sept.) parolos K-do Coll. Oni atendas por tiu kongr. salutlet. el tutmondo. (Coll). — **GERMANIO. Hamburg.** 14. julio okazis somera renkontiĝo de LEA-distrikto, kiun partoprenis 27 Gek-doj. Oni konstatis, ke dum tiu ĉi jaro nove fondiĝis grupoj en Wesermünde k Bad Oldesloe. **München.** En junio komenciĝis du kursoj por infanoj, unu ĉe "infanamikoj", unu ĉe "junpioniroj". La kursoj daŭros tutan jaron. 6 junulk-doj partoprenis la Vienan Jun. Kunvenon. — **Sovetio. Ĥarkov.** Radio-aŭskultantoj atentu, ke sekve de l' decidoj de la Praha Intern. Radio-Kongreso estas ŝanĝita la ondlongo de l' loka Radiotelefona Stacio. Ĝia ondlongo nun estas 1304 m. La dissendoj okazas regule ĉiudimanĉe je la 22-a vespere MET. Oni nepre skribu pri aŭdebleco. (Ĥarkov, Soveta placo, Radiostacio). **Novorossijsk.** Malgraŭ somera sezono ĉi tie funkcias du esp. rondetoj: elementa k supera. Por la vintra laboro oni interkonsentas kun partiaj k klerigaj organizoj. Sub influo de lokaj esp-istoj organiziĝis ĉe distrikta organizo de labkor-oj Sekcio de internacia korespondo. Esp-istoj gvidas tiun laboron. (5772.) — **SVEDIO. Sundbyberg.** La klubo "La internacia volo" aranĝis motorboatan ekskurson je 14. julio. La ekskurso okazis kun nova flago, muziko, manĝoj, esperantistidoj. En Stokholmo ni transprenis en la boaton Gek-dojn el la tiea lab. klubo k veturis al insuleto "Fläsket" (t. e. "lardo"), kie ni decidis sendi salutojn al ĉiuj esp. K-doj en la mondo. (Andersson.)



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Mihail Sadoveanu, NOBELA PEKO. Trad. Tiberio Morarin. Internacia Mondliteraturo, vol. 21. Eld. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, pĝ. 64. Form. 13×19 cm. Prezo: 1,60 mk. g.

Mihail Sadoveanu mem, se vere li talente tradukis rumanen verkojn de Maupassant, agnoskus, ke liaj tri verketoj "Nobela peko", "En arbaro Petriŝor" kaj "La sciigantoj" ne sufiĉe valoras, por tradukiĝi. Eble, en aliaj verkoj, li skribis aŭ skribos inde. Tiuj tri tre etaj verket-ĉjoj estas tute ne-sufiĉaj.

Burĝaro, ĉiam burĝaro: "RESPUBLIKO DE FLATULOJ". Por plaĉi al sinjoro Sadoveanu, deputito, akademiano, oni tradukas eĉ liajn senvalorajn verkojn. (Mi ne scias, ĉu li produktis valorajn.) Oni dediĉas al li antaŭparolon, en kiu troviĝas tiaj laŭdoj: "Sadoveanu estas unu el tiuj, kiuj antaŭ la akademia ETERNIGO, jam akiris SENMORTECON ĉe la publiko lin adoranta". Ho dio!

Eternigo, senmorteco, certe ne per la ĵus esp-en tradukitaj tri supre-nomitaj pecoj!

Nun mi vetas, ke la rumanlingvaj verkoj de Panait Istrati ankoraŭ ne esp-en tradukiĝis? Jen rumano, sinjoroj rumanoj. Jen verkaro! Kun fermitaj okuloj vi povas ĉerpi el tiuj verkoj kaj traduki, kvankam ilia aŭtoro nek deputito, nek akademiano estas.

"Nobela peko", kaj ankoraŭ pli "La sciigantoj", perdigis al mi tempon. Tion mi al vi ne povas pardoni, interflatuloj! J i e f.

Flandra Esperantisto, n-o 1, julio 1929. Organo de la Flandra Esperanto-Movado. Monata. 16 pĝ. Red. k Admin.: Jan van Schoor, Julius De Geyterstraat 149/I, Antwerpen. Jara abonprezo: 10 frankoj. Eksterlando: 3 belgoj. Form.: 16×25 cm.

"Flandra Esperantisto" volas esti la organo de ĉ i u j Flandraj esperantistoj k instigi ilin al kunlaborado k organizado en propra "Flandra Esp-ista Asocio". "Fl. Esp-isto" volas konigi al la eksterlandaj samideanoj la flandran celadon por propra kulturo k propra regado... "Fl. Esp-isto" unuvorte ne nur volas esti la parolilo de la flandraj esp-istoj, sed la parolilo de ĉiuj esp-istoj, kiuj simpatias kun la du fundamentaj ideoj, entenataj en nia devizo "Libera Flandrujo en paca mondo": memstareco por la flandroj, por ĉiuj gentoj; — paco inter ĉiuj popoloj!"... La ĉi supraj citoj sufiĉe bone karakterizas la novan gazeton k malnecesigas komenton.

Ilustrita prospekto sur luksa papero kun fotoj de la Sun- k Aerbanejo de Excelsior-Asocio Gräfnäs en Svedio. Esp.-lingva. Ricevebla ĉe Direktoro A. Rosenberg, S k a r a (Svedio).

V. Sutkovoj, ESPERANTO - RUSA VORTARO. 2-a eldono, 11—20-a miloj. Eld. CK SEU. Moskvo, 1929. Formato 11×16 cm. 216 pĝ. Kartonita. Prezo: 95 kop.

Plezure ni vidas la duan eldonon de tiu libro post tiom mallonga tempo de ĝia unua apero. Tio pruvas ĝian utilon k neceson. Certe ankaŭ tiu dua eldono trovos rapidan disvendiĝon, precipe se oni konsideras la modestan prezon. Oni scios ŝati la praktikan karton-bindaĵon, kiu permesas diligentan uzadon sen tuja ĉifiĝo.

Laŭ mia opinio la aŭtoro iom tro facilanime enmetis novajn radikojn, precipe el franca lingvo (kvankam li signis ilin per steleto). Ankaŭ niajn vortarojn ni pliriĉigu m o d e r e, k interkonsente kun la lingvaj instancoj. "Abandoni, uzino, vazistaso" mi senkompate forstrekus, se mi trovus ilin en manuskriptoj de mi korektotaj. N. B.

NEKROLOGOJ

La 7-an de julio mortis nia juna K-do

ANDREW W. FINDLAY (12 900)

Fininte elementan kurson li aktive laboris por antaŭenpuŝi la SAT-movadon.

Honoron al lia memoro.

Edinburga Lab. Esp. Grupo.

A. Sutterland (10347), Loka Peranto de SAT.

La 13-an de aŭgusto estis enterigata

K-do PROF. LEOPOLD KRONENBERG

unu el la plej agemaj esperantistoj en Polujo. Li estis aŭtoro de sennombraj artikoloj pri esp-o en pola gazetaro k gvidis sennombrajn kursojn de nia lingvo en div. urboj k perkoresponde. Li estis membro de "Lab. Esp. Asocio 'Laboro' en Pollando", siatempe fervora socialisto, membro de Urbkonsilantaro en Bydgoszcz, gimnazia profesoro. Li mortis tre juna, subite, pro korapopleksio. Kiel aŭtoro de plej populara en Poll. lernolibro de esp-o lia nomo restos en la historio de nia movado.

Lab. Esp. Asocio de Pollando.

NIA POŜTO

11 774. — Via anonco kostas 1,10 mk. g. Bonvolu ĝiri ĉi sumeton al nia Pariza poŝtĉeka konto.

Internacia Korespondsekcio

ĉe Distrikta Organizo de labkoroj serĉas koresp-antojn el ĉl. Skribu individue kaj kolektive. Adr.: USSR., Nordkaŭkazo, **Novorossijsk,** redakcio "Krasnoje Ĉernomorje".

Gesovetianoj atentu!

Por sciigi k klarigi la membrojn de nia komunista ĉelo pri rusaj aferoj, ni petas vin skribi multnombre al jena adreso:

K-do Blanchou, **la Coquille** (Dordogne) Francio.

Redakcio de murĵurnalo

de Centra Klubo "Sovtorgsluĵaŝĉiħ", Rostov sur Don

deziras korespondi kĉl. per let. kaj il. PK. Respondo garantiata.

Adreso: USSR. Rostov sur Don Centra Klubo de Sovtorgsluĵaŝĉiħ, Budenovski N 34

Redakcio de mura ĵurnalo.

Gek-doj el ĉiuj landoj!

Meze de septembro ni intencas aranĝi nian unuan

propagand- kaj varbsemajnon kun ekspozicio.

Por tio nia juna grupo ne posedas materialon. Tial ni petas vin, Gek-dojn k esp. grupojn, tuj sendi al ni PK, PI k. a. ekspoz-aĵojn. Ni laŭpove ĉion rekompencos. Adresu al: **K-do Clas Larsson, Lunden 452, Skoghall, Svedio.**

☆ GRANDA NIĴNI-NOVGOROD



Al tutmonda junularo!

Laboristaj k kamparanaj korespondantoj de "Leninskaja Smena" (Anstataŭantaro Leninista), novaperinta ĉiutaga ĵurnalo de l' junularo de l' ĵus organizita Niĵnij-Novgoroda lando (kraj), deziras korespondi kun proleta gejunularo de ĉiuj landoj pri la demandoj:

Situacio de laboristoj k laborista junularo (kondiĉoj de laboro, salajro ktp.), laboro de komjunularo k pioniroj, sporta movado, ateismo, kontraŭimperialista movado ktp.

Krom esperanto oni povas skribi en la lingvoj: angla, germana, franca k rusa.

Adreso:

USSR. Nijnij - Novgorod

ul. Sverdlova, dom 23,

Redakcio de "Leninskaja Smena"

PLENDO

Mi volas scii la motivojn, kial al mi ne respondis: K-do Johann Fritz (Aŭstrio) al mia let. de 1. 4. 1929, K-do Friedman Meyet (Usono) al let. de 23. 5. 29; K-do Fritz Löw (Germ.) al let. de 1. 4. 1929; K-do A. Segarra (Hisp.) al let. de 2. 6. 1929; Kdo Crouzeau (Francio) al let. de 1. 4. 1929; K-do Karl Dieblich (Ĉeĥosl.) al let. de 5. 4. 1929. — Jurij Ĉernjajev (14 948). Luganskij okrug, Brjanskij rudnik, Dvorec Kulturi; Sovetio.

Grava por Pollingvanoj!

Jam aperis

Plena Fundamenta Vortaro Esperanto-Pola

(inkluzive la 4 Oficialaj Aldonoj al "Fundamento"), eldonita de "Laborista Esperantista Societo "Laboro-Praca" en Pollando, Varsovio 1929.

ENHAVO:

De Eldonintoj, Oficiala Gramatiko, Tabelo de sufiksoj k prefiksoj, Tabelo de pronomoj k adverboj, Mallongigoj, Universala Vortaro, Klarigoj k aldonoj al "Fundamenta Vortaro": 1. Kio estas "Fundamento?"; 2. Konsisto k organizo de Lingva Komitato k Akademio Esperanta; 3. Esperanta Vortfarado; 4. Ĉu vere 4302, Akcento; 5. Bibliografio, — Informa k adresa parto, Anoncoj.

Mendebla k liverata nur al membroj de esp. organizoj aŭ grupoj aŭ per ili je la adreso: Jan Zawada, sekretario de "Laboro", Warszawa, Miasto-Ogrod Czerniakow, ul. Zaciszna 1. Pollando je la prezo de **2,50 zl.** sen sendkostoj. (Prezo en privataj librejoj 4 zl.)

Ĉiu same komencanta kiel progresinta esperantisto pollingva devas nepre havi la plej novan, oficialan Universalan Vortaron kun kompleta gramatika parto, anstataŭanta apartan lernolibron.

SAT-anoj, mendu rekte ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O. 27.

K-do V. V. Kalaŝnikov, Gruzinskij per., 6, kv. 6, Niĵnij-Novgorod, dankas ĉiujn respondintajn al li pro anonco en "S-ulo" n-o 242 kaj petas grandan pardonon pro ne tuja respondo, ĉar li devis forlasi urbon en mezo de majo por militservo en tendaro trimonata, de kie pro manko de libertempo korespondado ne estas ebla. Tuj post reveno en mezo de aŭgusto, ĉiu nepre ricevos respondon kaj kun ĉiu skribinto li korespondos. Saluton al ĉiuj!

SAT-ano 1125.

Okaze de la

Internacia Junulartago

la 4. IX. 1929, Nordkaŭkazia Junkomunista Komitato turnas sin al junkom. organizoj, junkomunistoj kaj laborista junularo kun peto **sendi salutojn kaj priskribojn de junulara vivo kaj batalo.** Al ĉiu ni nepre respondos. Adresu: K-do Aptekman S. M., Srednij pr. 39, kv. 6, Rostov-Don, Sovetio.

ENHAVO:

	pağo
La kalvario de la nigra raso . . .	501—02
El Alĝerio	502—03
La Laborista Problemo en Usono .	503
Pri klasbatalo	503—04
Viktimoj de la laboro	504
Skoghall en Svedio kaj ĝia esp. movado	504—05
El revolucio de 1905 en Rusio . .	504—05
En germana kuracloko	505—06
"Por nova moraro"	506—07
El la historio de l' Socialismo . . .	507
Diskutejo	507
Sennaciula Virina Paĝo	508
Tra Esperantio	509—12
Anoncoj	512

Preselo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)